



EL POPOLA ĈINIO

N-ro 10

Oktoĉbro

1968



毛泽东同志的伟大功绩在于，他把马克思列宁主义的普遍真理同中国革命的具体实际相结合起来，并且根据中国人民长期革命斗争的经验，加以创造性的发展，丰富和发展了马克思列宁主义。

1976

La brile farita olepenraĵo *Prezidanto Maŭ al Anjuan* multe kuraĝigas la komandantojn kaj batalantojn de PLA, kaj ili entuziasme huraas: “Vivu Prezidanto Maŭ!” “Senfine longan vivon al Prezidanto Maŭ!”



Prezidanto Maŭ al Anjuan *(olea pentraĵo)*

En la aŭtuno de 1921 nia granda instruanto Prezidanto Maŭ iris al Anjuan kaj persone bruligis la revolucion fajron tie.

Kolektive verkita de studentoj de pekinaj institutoj

Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Spektis Fortepianan Akompanion al Kantado de la "Ruĝa Signal-lanterno" kaj Simfonion "Ŝagiabang"

EN la 1-a de julio, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin Biaŭ ĉeestis la literaturan kaj artan vesperon okazigitan de la Grupo pri Kultura Revolucio de CK de KPCĈ por celebri la 47-an datrevenon de la fondiĝo de KPCĈ kaj spektis en ĝi fortepianan akompanion al kantado de la *Ruĝa Signal-lanterno*, novan kreon en la

granda proletara kultura revolucio, kaj la simfonion *Ŝagiabang*.

Kiam Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Biaŭ venis al la Popola Halo, la tuta ĉeestantaro ekstaris, alte levis la brile ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj entuziasme, longtempe hurais "Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!" "Vivu la ĉiamvenka penso de



Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Biaŭ kaj gek-doĵ Ĝoŭ Enlaj, Ĉe

Maŭ Zedong!” “Vivu, longe vivu nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ!” Tre ĝoje Prezidanto Maŭ intime mansvingadis kaj manklakadis al la kamaradoj en la tuta kunvenejo.

La fortepiana akompano al kantado de la *Ruĝa Signal-lanterno*, prezentita kune de

revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj de la Centra Muzika Ensemblo kaj la Ĉina Trupo de Pekina Opero, estas nove kreita laŭ la instrukcio de k-dino Giang King, dank’ al plena efektivigo de la principo de Prezidanto Maŭ **“utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo kaj utiligi la fremdlandajn**



Boda, Kang Ŝeng, Giang King kaj aliaj fotiĝas kune kun la ludantoj.

en servo al Ĉinio”, sub la brilo de la proletara literatura kaj arta linio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ĝi estas nova frukto akirita sur la literatura kaj arta fronto en la granda proletara kultura revolucio.

Post la prezentado nia granda instruanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko

Vicprezidanto Lin Biaŭ kaj gek-doj Ĝou Enlaj, Ĉen Boda, Kang Ŝeng, Giang King kaj aliaj iris sur la scenejon en varma hurado de la tuta ĉeestantaro, intime intervidiĝis kun ĉiuj revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj, kiuj partoprenis la prezentadon, kaj gratulis ilin pro ilia sukceso.



Li Juhe (rolata de Kian Haŭliang, akompanata de Jin Ĉengzong) en la pekina opero Ruĝa Signal-lanterno sub fortepiana akompano

HIN JI:

Nova Speco de Revolucia Arto

— La Fortepiana Akompano al Kantado
de la “Ruĝa Signal-lanterno”

LA Fortepiana Akompano al Kantado de la *Ruĝa Signal-lanterno* estas nova speco de la proletaraj revoluciaj literaturo kaj arto de nia lando, estas alia belega floro radianta de la brilo de la penso de Maŭ Zedong kaj kulturita persone de k-dino Giang King, granda standardportanto de la granda proletara kultura revolucio. Ĝi estas alia nova venko de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ.

Antaŭ pli ol 20 jaroj Prezidanto Maŭ jam instruis al ni: “Niaj literaturo kaj arto estas por la popol-

amasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.” Rilate al la antikvaj kaj eksterlandaj literaturo kaj arto, estas necese “utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo kaj utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio”. Sed dum longa tempo en la pasinteco la kontraŭrevolucia reviziisto Ĝoŭ Jang kaj liaj kunuloj rifuzis plenumi la instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj servigis la arton de pianoludo al manpleno da sinjoroj kaj fraŭlinoj de la burĝaro. La burĝaraj artistoj

intence misterigis la arton de pianoludo, dirante ke la pianoludo estas altklasa arto, kaj ke per piano oni povas ludi nur la t. n. mondfamajn muzikaĵojn de la 18-a kaj 19-a jarcentoj. Fakte la de ili nomataj altklasa arto kaj mondfamaj muzikaĵoj estas nenio alia ol varoj de kapitalismo kaj reviziismo plenaj de tenero, nebuleco aŭ afektitaj ĝemoj.

La figuroj, kiujn modlas la fortepiana akompano al kantado de la *Ruĝa Signal-lanterno*, estas la heroaj figuroj de la revolucia laboristo Li Juhe kaj lia filino Li Tiemej, kaj ĝi prikantas la meritplenajn heroaĵojn, kiujn kreis la laboristaj kaj kamparanaj amasoj por defendi la revolucion, la Partion kaj la patruon. En arto ĝi konservas la fundamentajn trajtojn de kantado en la Pekina Opero kaj samtempe plene utiligas la specialajn kvalitojn de la pianoluda arto. Ĝi estas riĉa frukto rikoltita en la kompleta efektivigo de la brila penso de Prezidanto Maŭ pri **“utiligo de la antikvaj en servo al la nuntempo kaj utiligo de la fremdlandaj en servo al Ĉinio”**. La fortepiana akompano al kantado de la *Ruĝa Signal-lanterno* perfekte kombinas la prezentan povon propran al la eksterlanda pianoluda arto kun la nacia formo kaj nacia stilo propraj al la Pekina Opero de Ĉinio. Ekzemple, la fortepiana akompano por la kanto *Ĉiuj Havas Ruĝan Koron* el la *Ruĝa Signal-lanterno* estas karakterizita per sereno, ĝojo kaj plenvigleco. Tio tre vive, realece kaj ekzakte bildigas la naivan, pasian kaj iom infanecan naturon de Li Tiemej. La kanto *Kiel Homo Oni Devas Esti Tia* estas

pli lirika en tono, kaj la aktorino kantas mallaŭte la du frazojn “La onkloj volonte faras sangan sinoferon. Pro kio ili tiel agas?” Ĉi tie la fortepiano akompanas nur per kelkaj tre rafinitaj tonoj kiuj aparte allogas kaj perfekte konkordiĝas kun la ekstreme profunda kaj subtila sento de la aktorino. En la returnludo antaŭ la kantado “Por savi Ĉinion kaj la malriĉulojn kaj venki la japanan armeon” la pianoludo estas laŭta, energia kaj ekscitiga kaj tiel enkondukas la impone vastan tonon de Tiemej. Kiam ŝi kantas la frazon “Paĉjo sin ŝarĝas per mil-ĝina pezo”, la pianoludo emfazas la vorton “pezo” per solide forta akordo kaj bone esprimas la decidon de Tiemej ne timi tiranecon kaj kuraĝe preni sur sin pezan ŝarĝon. La supraj ekzemploj montras, ke la disvolvo de la karakterizaj trajtoj de fortepiana akompano multe pliriĉigis la muzikon de la Pekina Opero kaj bone sukcesis kombini la ĉinan muzikon kun tiu de la Okcidento, ĉerpi bonon kaj ripari mankon, kaj per tio elhakis novan vojon por okcidentaj muzikiloj kaj simfonio kaj por la akompano de ĉinaj teatraĵoj. Ni firme kredas, ke la sukceso de la kreado kaj prezentado de la fortepiana akompano al kantado de la *Ruĝa Signal-lanterno* ne nur antaŭenpuŝas la viglan disvolviĝon de la arto de la ĉinaj teatraĵoj, sed ankaŭ pli pompe prosperigos diversajn florojn de la novaj literaturo kaj arto de la labortistoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitajn kaj ekdisvolvitaĵojn dum la granda proletara kultura revolucio sub la sunlumo de la penso de Maŭ Zedong.

Li Tiemej (rolata de Liu Ĉangju, akompanata de Jin Ĉengzong) en la pekina opero Ruĝa Signal-lanterno sub fortepiana akompano



Pri la Olepentraĵo

"Prezidanto Maŭ al Anjuan"

ANTAŬ ni sterniĝas la glimbrila olepentraĵo
Prezidanto Maŭ al Anjuan.

Aŭtune 1921, la suferplena ĉina nacio baraktis en ŝtormo. En kiom da frostaj noktoj kaj tagiĝoj la pli ol 17,000 karboministoj kaj fervojistoj de Anjuan troviĝantaj en frostoj kaj malsato sopiris la savanton rigardante la polusan stelon, kaj atendis la levigon de la ruĝa suno en la oriento

Ĝuste tiam alvenis grandpaŝe nia granda instruanto Prezidanto Maŭ post peniga vojaĝo. Li estas plena de freŝa juneco kaj revolucia entuziasmo, en duonuzita blua katonrobo kaj ŝuoj kun kiuj li transpasis Hianggiang-riveron, kun ombrelo de Hunan en la mano.

Jen! Liaj okuloj travidantaj la kapricajn situaciojn de la epoko rigardas la longmarŝotan revolucionan vojon. Lia ferpugno plena de forto kvazaŭ frakosas la damnindan malnovan mondon. Lia senlime larĝa sino entenas la vastan patrion kaj milionojn da soldatoj! Lia aplomba kaj firmvola mieno montras ke li komponas la triumfan bluplanon de la ĉina revolucio. La brila talento-plena figuro de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ en sia juneco majeste staras sur la montsupro de Anjuan.


Ekde tiam la 17,000 frataj laboristoj trovis sian vojkondukanton, la stiriston en marnavigado. Alvenis la tagoj, kiam la proletaro plene vekigis. La laborista movado de Anjuan similis al ŝpruconta vulkano kaj sago sur streĉita pafarko. Tuj eksplodis terrenversa revolucia ŝtormo.

Post la veno al Anjuan, Prezidanto Maŭ kondukis grandan revolucionan praktikon. Ĉie estis trovitaj la brilaj paŝosignoj de Prezidanto Maŭ. Li vizitis ĉiujn ŝaktojn, laboristajn budojn kaj galeriojn; kvazaŭ printempa tondro lia voĉo sonis en la oreloj de laboristoj; kvazaŭ torĉo en la malluma nokto lia granda penso prilumis la korojn de laboristoj. Rapide disvastiĝis ĉien la revolucia fajro persone bruligita de Prezidanto Maŭ. La laboristoj varme amas Prezidanton Maŭ, la koro de Prezidanto Maŭ ligiĝas strikte kun tiuj de laboristoj.

En Anjuan Prezidanto Maŭ plurfoje faris geniajn decidojn por konduki la fratajn laboristojn trarompi kruelajn subpremojn kaj lanĉis la armitan ribelon. Prezidanto Maŭ gvidis la laboristaron de Anjuan elhaki vojon de armita revolucio. Tio ĉi estas la vojo de venko al venko.

La olepentraĵo *Prezidanto Maŭ al Anjuan* prikantas kun senlime profunda sento la grandan historian eventon de la armita batalo de la anjuanaj laboristoj gvidata de nia ruĝa ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ kaj solene proklamis: Anjuan estas ruĝa regiono persone kulturita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Kvazaŭ akra glavo ĝi senkompate forhakis la nigran manon de la ĉina Ĥruŝĉov etenditan al Anjuan kaj forŝiris la mantelon de la tiel nomata "revolucia veterano" pretendita de la ĉina Ĥruŝĉov pri gvido de la granda striko de la karboministoj kaj fervojistoj en Anjuan, tre profunde kaj akre kritikis la reviziisman laboristmovadan linion kaj reviziisman partikonstruan linion de tiu ĉi kontraŭrevolucia veterano. Sekve, ĝi estas triumfa kanto de la proletara re-

La revoluciaj laboristoj de Anjuan-karbominejo varme aklamas la publikigon de la revolucia olepenraĵo Prezidanto Maŭ al Anjuan. Veteranaj ministroj de Anjuan, kiuj havis la feliĉon vidi la grandan instruanton Prezidanto Maŭ, varme laŭdas la revolucion olepenraĵon fiksrigardante la brilan figuron de Prezidanto Maŭ.




volucia linio de Prezidanto Maŭ kaj brila kristalo de la movado de revolucia amasa kritiko!

Prezidanto Maŭ al Anjuan estas entuziasma poemo prikantanta nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. Ĝi figure reaperigis la grandan turniĝon de la anjuan-a historio en la aŭtuno 1921, sukcese modlis la brilan figuron de Prezidanto Maŭ, la plej granda instruanto de la nuntempa proletara revolucio, en la junaĝo kiam li profundiĝis en laboristajn kaj kamparanajn amasojn kaj faris grandan revolucion praktikon. Ĝi plene prezentas la noblan spiriton de Prezidanto Maŭ. La tuta penraĵo sukcese reliefigas la subjekton, kaj estas hela en tono kaj konciza en kompono. Ĝi estas arta trezoro kun granda sukceso, aperinta en la granda proletara kultura revolucio.

Eĉ per miloj da kantoj oni ne povas esprimi la grandajn meritojn de Prezidanto Maŭ. De la fajrero de Gingsang-montaro ĝis la olelampo en la kaverndomo de Jan-an, de la flirtanta ruĝa standar-

do super la urbpordego de Zunji ĝis la ceremoniaj salvoj de Tian-anmen-pordego, de la ruĝa ŝtormo de Anjuan-karbominejo ĝis la mondsdua dazi-baŭo *Bombardu la Komandojn*, — kie en la revolucia militiro trans montoj kaj riveroj ne estas la piedsignoj lasitaj de Prezidanto Maŭ! En kiu navigo ne estas Prezidanto Maŭ kiu direktis la revolucion ŝipon tra ondegoj! En la pasintaj 47 jaroj, la bravaj gefiloj de la ĉina popolo, laŭ la proletara revolucia linio montrita de Prezidanto Maŭ, liberigis la landon per la armita batalo kaj starigis la ruĝan regpotencon de la proletaro, forbalais ĉiujn reakciulojn per la revolucia ferbailo kaj tiel disvolvis la senprecedence grandan revolucion sub la proletara diktaturo. Nun, kiam ni promeniĝas niajn rigardojn tra la vasta patrolando, ni vidas, ke flirtas en vento la ruĝaj standardoj de la revoluciaj komitatoj, torentas antaŭen la tajdo de la granda proletara kultura revolucio. La brila penso de Prezidanto Maŭ nun direktas nin batali por realigi komunismon!



Fremdlandaj Maristoj Korinklinas al Prezidanto Maŭ

ŜIPOJ veturas unu post alia al la oriento, ĉiuj koroj inklina al la ruĝa suno.

Ĉiujare, niaj marhavenoj konstante akceptas fremdlandajn maristojn, kiuj havas malsamajn haŭtokolorojn kaj parolas malsamajn lingvojn. Ofte en diversaj manieroj ili esprimas sian varman amon al Prezidanto Maŭ kaj estimon al la nova Ĉinio. Ilia varma amo al Prezidanto Maŭ kaj al la nova Ĉinio estas esprimo de la profunda amikeco, kiun la popoloj de la mondo havas por la ĉina popolo.

POR VIDI PREZIDANTON MAŬ MI NE TIMAS EĈ PLI GRANDAN DANĜERON

Kiam iu turka maristo, kiu unuafoje venis al Ĉinio, akiris de ĉina amiko unu ekzempleron de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj unu insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ, li tre ĝojis kaj diris tenante en la mano la trezoran libreton: “Mi fine trovis la veron!”

Tiu maristo diris al la ĉina amiko, ke antaŭe li ne estis maristo, sed li delonge sopiris al Pekino kaj Prezidanto Maŭ. Por efektiviĝi sian deziron li decideme ŝanĝis sian okupon, kaj sub la helpo de amiko li fariĝis maristo kaj fine venis al Ĉinio.

Li esprimis al la ĉinaj amikoj la varman amon de la turka popolo al Prezidanto Maŭ. Li diris: “Ĉifoje, mi venis al Ĉinio riskante grandan danĝeron. Sed por havigi al mi okazon lerni la penson de Maŭ Zedong, vidi Prezidanton Maŭ kaj vidi la grandan kulturen revolucion de Ĉinio, mi ne timas eĉ pli grandan danĝeron. La turka popolo tre varme amas Prezidanton Maŭ. Antaŭ la ekveturo al Ĉinio miaj amikoj foje-refoje atentigis min, ke mi reportu de Ĉinio multe da verkoj de Prezidanto Maŭ.” Fine, li esprimis al la ĉinaj

kamaradoj, ke li nepre diligente studos verkojn de Prezidanto Maŭ.

“NIA KORO INKLINAS AL MAŬ ZEDONG!”

Iutage, la kapitano kaj ĉefa asistanto de iu pakistana ŝipo venis al la Internacia Marista Klubo de Ĝangiang. Vidinte tie la laborantojn, ili diris: “Ni deziras akiri portreton de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Bonvolu helpi nin!” Por kontentigi ilian ardan deziron, niaj laborantoj donacis al ili grandan enkadrigitan portreton de Prezidanto Maŭ. Firme premante la manojn de la ĉinaj amikoj, ili diris kun emocio: “Prezidanto Maŭ estas la ruĝa suno en nia koro, kiu lumigas por ni la linion de navigacio.” Reveninte al sia ŝipo, ili dum longa tempo ne povis kvietiĝi. Por ke ĉiuj povu konstante vidi Prezidanton Maŭ, ili speciale pendigis la portreton sur la muron de la salono de la ŝipo, kaj borderis ĝin per elektraj lampoj kun aldono de multaj freŝaj floroj, por ke la figuro de Prezidanto Maŭ aspektu pli brile. En la sekvinta tago, kiam la ĉinaj laborantoj vizitis ilin sur la ŝipo, kun vigla humoro ili diris montrante la portreton de Prezidanto Maŭ: “Nia koro inklina al Maŭ Zedong. Kien ni alvenos, tie lumigos la ruĝa suno.”

UNU PORTRETO DE PREZIDANTO MAŬ

Iuantaŭtagmeze, ĉina laboranto plenumis sian taskon sur iu fremdlanda ŝipo. Dum ripoztempo iu mezaĝa hispana maristo invitis lin al sia kajuto. Tie, la maristo malfermis sian valizon, atenteme prenis el ĝi pentritan portreton de Prezidanto Maŭ, kaj ĝin montris al la ĉina amiko dirante: “Granda estas Maŭ Zedong! Saĝa estas nia instruanto Maŭ Zedong!” La ĉina amiko demandis:

Ĉu vi mem pentris la portreton?" Kun rideto li diris modeste: "Mi ne vizitis lernejon, tial malbone mi pentris." Kaj li tuj klarigis, kial li pentris la portreton de Prezidanto Maŭ.

Jam pli ol dek jarojn tiu hispana maristo havis ŝancon venadi al Ĉinio kiel ŝipano. Li proprakule vidis la grandan progreson de Ĉinio en socialisma konstruado kaj la senĉesan pliboniĝon de ĝia popola vivo, atingitajn sub la saĝa gvidado de Prezidanto Maŭ. Tamen lia propra lando ankoraŭ restas sub la regado de faŝismo kaj la popolo vivas en netolerebla mizereco. Tial, ĉiufoje, kiam li revenis al sia patrolando, li ĉiam diris al aliaj: "Bona estas Ĉinio! Bona estas socialismo! Bona estas Maŭ Zedong!" Pro tio, tiu hispana maristo kun ekstreme granda emocio pentris la portreton de Prezidanto Maŭ kaj ĝin portas ĉiam kun si.

LA GREKA POPOLO AMAS MAŬ ZEDONG!

Iutage, greka maristo tre ĝoje ricevis de ĉina amiko insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ kaj invitis la lastan al sia kajuto. En la kajuto, la ĉina amiko tuj estis interesata de la vidaĵo: sur la tablo troviĝis globuso, sur kiu estis fiksitaj diversaj ore brilaj insignoj kun portreto de Prezidanto Maŭ. Tiu ĉi greka maristo klarigis: "Tiu insignoj estas donacitaj al mi de ĉinaj amikoj en Ŝanhajo." Kaj li daŭrigis: "Maŭ Zedong estas la plej granda gvidanto en la nuna epoko kaj la

ruĝa suno en la koro de nia greka popolo. La greka popolo tre varme amas Maŭ Zedong. Ĉiufoje, kiam miaj amikoj en Grekio informiĝis, ke mi veturos al Ĉinio, ili foje-refoje atentigis min: "Lasu donacaĵon alian, sed ne forgesu reporti de Ĉinio insignojn de Prezidanto Maŭ." Kaj ĉiufoje, kiam mi revenis hejmen, ili ĉirkaŭis min por peti insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ, tial mi devas klopodi ĉi tie por akiri pli da insignoj, por ke la brilo de la ruĝa suno lumigu la koron al pli multaj grekaj popolanoj." Post paŭzeto, li daŭrigis, montrante la globuson sur la tablo: "Ni fiksas tiujn insignojn kun portreto de Prezidanto Maŭ sur la globuson, por simboli ke la brilo de la ruĝa suno lumigas la tutan terglobon.

LONGAN VIVON AL PREZIDANTO MAŬ

Estis profunda nokto. Kelkaj maristoj de sovetia komercŝipo, kiu ankris en iu haveno de nia lando, senbrue venis al la deĵorĉambro de ĉinaj kontrolistoj kaj sincere petis la ĉinajn kamaradojn instrui al ili la ĉinlingvan frazon: "Longan vivon al Prezidanto Maŭ!" Ili diris: "Ellerni tiun ĉi frazon estas kora deziro de ni sovetia popolo." Tion aŭdinte, la ĉinaj kamaradoj tre kortuŝiĝis kaj pacience instruis al ili vorton post vorto, ĝis ili fine ellernis la tutan frazon. Ĉe la adiaŭo la sovetiaj maristoj premis la manojn al la ĉinaj kamaradoj kaj kun profunda korsento diris en la ĉina lingvo: "Longan vivon al Prezidanto Maŭ!"



*Alte tenante la jur-
nalon, en kiu estas pu-
blikita la Deklaro de
Prezidanto Maŭ por
Subteni la Batalon de
la Usonaj Nigruloj
kontraŭ Perforta Sub-
premo, la grekaj ma-
ristoj ekscitiite krias:
" Vivu, longe vivu
Prezidanto Maŭ! "*

Longan Vivon al Prezidanto Maŭ

A-ma- ta Pre- zi- dan- to Maŭ, Ruĝa

sun' en ni- a kor', A-ma- ta Prezi- danto Maŭ, Ruĝa sun' en ni- a

kor'. Ni ha- vas ki- om da vor- toj por di- ri al Vi el kor- fund',

Ni ha- vas ki- om da kantoj por kan- ti al Vi en fer- vor'. Aj!



Ruĝko- roj mil- jon for-te- ge ba- tas, Vi- za- ĝoj mil- jon ri- das al ruĝ-sun'.



Ni de- zi- ras al Vi, ni- a ka- ra, longan vi- von, longan vi- von, lon- gan vi- von el la



kor'! Ni de-zi- ras al Vi, ni- a ka- ra,



longan vi- von, longan vi- von, lon- gan 'vi- von el la kor'!



Triumfaj Kantoj

el la Produkta

Fronto de Indus-

trio kaj Agrikulturo

VENKOJ EN KARBOINDUSTRIO

La 20-an de majo, 1968 nia plej amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko vicprezidanto Lin donis aŭdiencon al la reprezentantoj, kiuj ĉeestis la Kunvenon por Teni la Revoicjon kaj Stimuli la Produkton en la Karbominejoj. Kiam tiu aparte ĝojiga informo disvastiĝis tra la tuta lando, ĝi fortege stimulis la vastajn amasojn de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj kaj iliaj familianoj en la diverslokaj karbominejoj kaj akcelas la rapidan disvolviĝon de la revolucia kaj produkta situacio sur la karboindustria fronto.


La meznombra ĉiutaga produktkvanto de la grandaj karbominejoj rekte sub administrado de la Karboindustria Ministerio en la lasta tagdeko de majo plialtiĝis je 24.29% kompare kun tiu de la unua kaj dua tagdekoj de tiu monato, kaj ankaŭ la produktkvanto de la lokaj ŝtataj karbominejoj

kreskis rimarkinde. Interalie, la ĉefaj karbominejoj kiaj Kajluan, Fengfeng, Gingging, Ŝuangja, Zibo, Zaŭĝuang, Pinghiang, Huajbej, Benhi, Fuhin kaj Datong antaŭdate superplenumis siajn produktplanojn de majo, multaj mindistriktoj kreis la plej altan produktan rekordon en la lastaj jaroj kaj novaj atingoj ankaŭ aperis en la enfosa rapideco.

PROSPERO SUR LA PEKINA MERKATO

En la triumfa kanto de la batalo por akiri la plenan venkon de la granda proletara kultura revolucio, sekvante la grandan orientilon de Prezidanto Maŭ “**teni la revolucjon kaj stimuli la produkton**”, la proletaraj revoluciuloj kaj la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj sur la komerca fronto de Pekino forte tenas la klasan batalon kaj la batalon inter la du linioj kaj aktive klopodas por bone plenumi la taskojn de aĉeto, distribuo kaj provizado de varoj, tiel ke aperis

Karbo elfosita de Vuda-karbominejo en Interna Mongolio estas senĉese transportata aliloken por subteni la socialisman konstruadon de la patrolando.



bonega revolucia situacio de prospero sur la socialisma merkato de nia ĉefurbo kaj ĝia kamparo.

De la kuranta jaro, la merkato de la ĉefurbo estas en ĉiam pli bona situacio. La enaĉeta kvanto de industriaj produktaĵoj por ĉiutaga uzo kaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kreskas monaton post monato, pli kaj pli multiĝas la specoj kaj varioj de varoj kaj kreskadas la kvanto de varoj transportataj al la kamparo kaj aliaj lokoj kaj akumulataj en la tenejoj. La monata enaĉeta kvanto de multaj ĉefaj vivbezonaĵoj kiaj kotona ŝtofo, trikotaĵoj, alumetoj, sappulvoro, sapo, radioriceviloj, aluminiuj kaldronoj kaj ampoloj pli iĝis grandskale en komparo kun tiu de la jarkomenco. Granda kvanto da teksaĵoj, skribiloj kaj aliaj kul-

turaj bezonaĵoj, medikamentoj kaj drogoj kaj kemi-industriaj produktaĵoj transportiĝas en abundo al aliaj lokoj. Tiel en la grandaj vendejoj kiaj la Pekina Magazeno, la Pekina Bazaro de Manĝaĵoj kaj la Hidana Legombazaro kiel en la vendaĉetaj kooperativoj en ĉiuj vilaĝoj abundas industriaj produktaĵoj por ĉiutaga uzo, viandoj, ovaĵoj, legomoj kaj aliaj flankmanĝaĵoj, kaj iras vigla komerco.

La abundo de varoj kaj vicleco de komerco en nia ĉefurbo kaj ĝia kamparo estas granda venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj giganta frukto de la granda orientilo "tena la revolucion kaj stimuli la produkton" elmetita de Prezidanto Maŭ. La bolanta revolucia situacio sur la industria fronto de Pekino antaŭenpuŝas

la firman disvolviĝon de ĝia industria produktado. La ŝpinteksa kaj aliaj malpezaj industrioj, kiuj rekte koncernas la vivon de la popolo, alportis unu post alia venkajn informojn en la lastaj monatoj, kaj la senĉesa kreskado en la produkto metis solidan materian fundamenton por la merkata prospero.

RIĈA RIKOLTO DE SOMERAJ PLANTAĴOJ EN SIĈUAN


Sub la brilo de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, bonega estas la revolucia kaj produkta situacio en la kamparo de Siĉuan-provinco. Surbaze de la ĉiuflanka abundega agrikultura rikolto en la pasinta jaro, riĉa rikolto de someraj plantaĵoj kaj ĝenerala pliprodukto de tritiko, pizo, fabo k. a. estas atingitaj.

En la vintro de 1967 kaj printempo de la kuranta jaro, pli ol cent mil laborfortoj estis mobilizitaj al riparo de la irigacia sistemo de Dugiangjan sur la ebenejo de Siĉuan. La vastaj amasoj de komunumanoj grandskale organizis studrondojn de la penso de Maŭ Zedong sur la konstruejo, venkis diversajn malfacilojn kaj antaŭdate plenumis la

taskon de riparo de la tuta irigacia sistemo, disvolvante la proletaran revolucionan spiriton de la daĝaj-anoj sin apogi sur la propraj fortoj. Kaj en la subprovincoj Mianjang, Jibin, Nejgiang, Leŝan, Vanhian, Fuling k. a. disvolviĝis amasa konstruado de akvoutiligaj konstruoj ĉefe malgrandtipaj, kun la spirito de sinapogo sur la propraj fortoj. En diversaj lokoj konstruiĝis granda nombro da malgrandaj irigaciaj laĝetoj, digetoj kaj kanaletoj, tiel ke la printempa irigaciado iris pli bone ol iam ajn antaŭe. Dum la printempa kamlaborado, la membroj de multaj komunumoj kaj brigadoj aktive preparis kaj kolektis sterkon kaj plantis herbojn por sterkofarado. Tiel, ili pretigis grandan kvanton da sterko por la produktado. Dank' al uzo de granda kvanto da sterko preparita de la kamparanoj mem, la produktkvanto de tritiko de Vengiang-subprovinco altiĝis kaj la produkta memkosto multe reduktiĝis.

GRAVITPUNKTAJ AKVOUTILIGAJ KONSTRUOJ FINITAJ EN ŜANDONG

La konstruaj laboroj por jungi la Flavan Riveron, Tuhaj-riveron, Magia-riveron kaj Jang-riveron kaj




fosi la kanalon Ruĝa Gvardio jam aŭ fundamente plenumiĝis unu post alia. Tiuj konstruoj ludos gravan rolon en prevento de inundo de la Flava Rivero, en venko de superakvo pro riverŝvelo aŭ tro multa pluvo sur la ebenejo kaj en defendo kaj disvolvo de la industria kaj agrikultura produkto de Ŝandong-provinco.

Kun senlima fideleco al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, firme respondante la grandajn alvokojn de Prezidanto Maŭ “**Nepre jungu Huaj-riveron**”, “**Bone aranĝu la Flavan Riveron**” kaj “**Nepre jungu radikale Haj-riveron**”, pli ol 1,500,000 popolanoj kaj revoluciaj kadroj de Ŝandong sin ĵetintaj en la akvoutiligan konstruadon en la vintro de 1967 kaj la printempo de la kuranta jaro militiris kontraŭ la Flava Rivero, portante surŝultre la gloran taskon komisiitan de la tut-provinca popolo. Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, ili batalis kontraŭ la naturo sen timo pri penego kaj laco, kun la revolucia spirito “reformi Ĉinion laŭ la ekzemplo de la monttranslokiga Malsaĝa Avo”, kaj akiris gigantajn sukcesojn. Jam estis fundamente plenumita la plano de efektivigo de 62

akvoutiligaj projektoj en la tuta provinco dum ĉijara printempo.

RIĈA RIKOLTO AKIRITA DE LA SENJUNTTUBA FABRIKO DE LA ANŜAN-A FERŜTALA KOMPANIO KAJ EN REVOLUCIO KAJ EN PRODUKTO

La vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Senjunttuba Fabriko de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio en la sudorienta parto de Liaŭning-provinco de nia lando forte tenas la revolucion kaj energie stimulas la produktadon, tiel ke en la tuta fabriko aperis la nova aspekto de venkoj kaj en revolucio kaj en produkto. Ili profunde kaj longdaŭre kondukis la amasan revolucion kritikadon, senĉese eliminis la venenan reviziisman influon de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio kaj tiu fabriko kaj malkovris unu post alia la perfidulojn, spionojn kaj kontraŭrevoluciulojn enŝteliĝintajn en la vicojn de la laboristaro. Tio forte ekzaltis la spiriton de la laboristaro, forte batis la arogantecon de la klasaj malamikoj kaj sekve akcelis la disvolviĝon de la produktado. De la komenco de la



Maldekstre:

Revoluciaj laboristoj kaj oficistoj interparolas kun kamarado el PLA por subtenado al la maldekstruloj pri kompreno el la propra sperto en kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ.

Dekstre:

La pramistoj de la filio de la Nankina Fervoja Buroo forte tenas la revolucion kaj energie stimulas la produktadon kaj garantias la ĝustatempan transporton de pasaĝeraj kaj frajtaj vagonaroj trans Jangzi-riveron.

kuranta jaro, tiu fabriko superplenumis la taskojn en ĉiu monato kaj krome sukcese provproduktis pli ol 30 novajn specojn de fabrikaĵoj. Depost aprilo, la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj energie klopodas studi kaj apliki la penson de Maŭ Zedong en diversaj specoj de stud-rondoj de la penso de Maŭ Zedong, kio pliapaŝe stimulis ilian revolucionan entuziasmon, kaj kreis multajn novajn rekordojn en produktado.

Kaj krome, laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ **“sin prepari al eventuala milito, sin prepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj servi al la popolo”**, ili lanĉis ĝeneralan atakon kontraŭ la teknikaj malfacilaĵoj kaj pogrande produktis pionirajn fabrikaĵojn kun eksterordinara grandeco, malgrandeco, dikeco aŭ maldikeco.

NOVA MONATA PRODUKTO-REKORDO DE LA TIANGIN-A NOV-HAVENO

Sub helpo de la PLA-anoj por subteni la malděkstrulojn, la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Tiangin-a Nov-haveno, la plej granda internacia komerca haveno en norda Ĉinio, serioze certigis la plenumon de la serio da plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ, profunde disvolvis amasan revolucionan kritikadon kaj lanĉis furiozan atakon kontraŭ la klasaj malamikoj, tiel ke aperis bonega situacio kaj en revolucio kaj en produktado. En majo, tiu haveno superplenumis je 17.8% la taskon de transportado, ŝarĝado kaj malŝarĝado kaj kreis la plej altan rekordon de monata produkto post fondo de la haveno. La en- kaj el-porta kvanto de varoj en la unua duono de junio estis 9.9% pli granda ol tiu de la sama periodo de majo.

ĜENERALA RIĈRIKOLTO DE PRINTEMPE MATURAJ PLANTOJ EN GIANGHI

Sub la bonega situacio de la batalo por la plena venko de la granda proletara kultura revolucio, ĝenerala riĉrikolto de pli ol kvar milion muoj da printempe maturaj plantoj estas akirita en Gianghi-provinco. La pomua produktkvanto de kolzosemoj plialtiĝis je 10 procentoj, kaj ĝojiga konsiderinde grandskala pliprodukto estas akirita ankaŭ en la kulturo de hordeo, tritiko, fabo, pizo k. a. printempe maturaj plantoj.

Dum la lasta vintro kaj la sekvinta printempo, komandante kaj antaŭenpuŝante la produkton per la revolucio, la vastaj amasoj de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Gianghi-provinco plifortigis la flegadon de la printempe maturaj plantoj kaj klopodis ĉiamaniere por akiri abundan rikolton. La kampanoj de Hukoŭ-gubernio, fama produkto de kolzosemoj en tiu provinco, plene efektivigante ĉiun el la serio da plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ, faris la revolucion potenca kiel uragano kaj antaŭenpuŝis la produktadon kun arda fervoro. Dank' al la ĝisĉiela entuziasmo en laboro, la ĉijara produkta kvanto de kolzosemoj pliiĝis je 79% ol tiu de la pasinta jaro. Ankaŭ la produktkvanto de hordeo, tritiko k. a. plantaĵoj superis respektive la plej altan jarproduktan kvanton en la historio.

PLI OL 2,000 HIGIENAJ LABORANTOJ DE GILIN EN LA KAMPARON


Firmdecide plenumante la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ **“meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon”**, la medicinaj kaj higienaj institucioj en diversaj niveloj de Gilin-provinco organizis lastatempe grandan nombron da kamparaj sanprotektaj taĉmentoj kaj ilin sendis sur la plejfronton en la kamparo por servi la vastajn amasojn de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.

Tiuj kamparaj sanprotektaj taĉmentoj formiĝis el pli ol 2,100 revoluciaj medicinaj kaj higienaj laborantoj de la medicinaj kolegioj kaj la medicinaj kaj higienaj institucioj provincaj, urbaj kaj guberniaj de Gilin-provinco. Tiuj taĉmentoj servas samtempe ankaŭ kiel propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong. Enprofundiĝinte en la kamparon kaj la malproksimajn regionojn, la blankbluzaj batalantoj de tiuj taĉmentoj unuflanke studas, propagandas kaj efektivigas la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ, aliflanke preventas kaj kuracas malsanojn por la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj fiksloke aŭ rondirante, disvolvas amasan laboron de sanprotektado kaj laŭplana gravedigo kaj kulturaj higienajn laborantojn por la kamparo. Kaj samtempe, ili ankaŭ aktive partoprenas la grandan proletaran kulturalan revolucion, kune kun la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kritikas la burĝaron kaj penas remuldi sin en ideologio.

En la unua duono de la kuran-
ta jaro, la Ĝenerala Paper-
fabriko de Pekino atingis la
plej altan produktan nivelon
post sia fondiĝo. La specoj de
papero por presado de verkoj
de Prezidanto Maŭ plimul-
tiĝis de du en 1967 ĝis 7, kaj
la produkta kvanto de papero
por stereotipa presado de
verkoj de Prezidanto Maŭ
pligrandiĝis je 56 procentoj.



La Tiangin-a Lin-teksejo ple-
numis sian produktan planon
por la unua duonjaro antaŭ-
date je 7 tagoj.





Riĉa rikolto de kolzosemoj en Jibin, Siĉuan-provinco

ABUNDEGA RIKOLTO DE ĈIAJ SOMERE MATURAJ PLANTOJ AKIRITA EN ĜEJIANG

Bonega somerrikolta situacio regas ĉijare Ĝe-jiang-provincon sur la bordo de la Orienta Maro de nia lando. Tiel sur la ebenejoj kaj insuloj kiel en la montregionoj ĉie aperis ekvilibra grandarea altprodukto, kaj abundega rikolto estas akirita ĉu en kulturo de hordeo, tritiko, fabo, kolzosemo k. a. somere maturaj plantaĵoj ĉu en bredado de silkraŭ-
poj. Kaj krome aperis nombro da tipaj ekzem-
ploj de grandarea altprodukto.

TASKO DE SUKERPRODUKTO SUPER- PLENUMITA EN GUANGHI

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj sur la sukerproduk-
ta industria fronto de la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, unu el la ĉefaj sukerproduk-
taj regionoj de nia lando, akiris rimarkindan suk-
ceson en produktado. En la pasinta jaro estis akirita abundega rikolto de sukerkanoj. Por plenumi la sukerproduktan taskon, krom la plene funkciantaj mekanikaj grandaj kaj mezgrandaj sukerproduktejoj, ankaŭ pli ol 490 malgrandaj premaŝinoj kaj pli ol 1,470 indiĝenaj premiloj

aplikigis en la produktado. Je la fino de aprilo de la kuranta jaro, oni jam superplenumis la pro-
duktan taskon de la sukerkan-prema sezono kaj la produktkvanto de sukero superis tiun de la antaŭa sukerkan-prema sezono je pli ol 20 procentoj.

KONTRIBUO DE 30,000 INTELEKTAJ JUNULOJ DE ŜANDONG AL LA KAMPARO

La 30,000 elurbaj intelektaj junuloj, kiuj fiks-
loĝigis en la vasta kamparo de Ŝandong, senŝan-
celiĝe iras la vojon montritan de nia granda gvi-
danto Prezidanto Maŭ kombiniĝi kun la malriĉ-
kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj humile lernadi de ili, ludis grandan rolon en la tri grandaj revoluciaj movadoj en la kamparo kaj estis harditaj kaj konscialtigitaj.

La plejparto de tiuj junuloj fiksloĝiĝintaj en Jimeng-montregiono, ĉe la bordoj de la Flava Rivero, kaj sur Giaŭdong-duoninsulo kaj la Okcidentŝandong-a Ebenejo iris organizite en la kam-
paron en 1962. Ili prenas la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *La Direkto de la Junulara Movado* kiel ĉiam observendan maksimumon kaj sin stimulas per ĝi al porĉiama kombiniĝo kun la malriĉkam-



La fiŝkaptado de Ĝouŝan-insularo iras en prospero.

paranoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Multaj antaŭaj vilaĝaj kadroj kaj veteranaj milicianoj en la malnovaj revoluciaj bazlokoj en Jimeng-mont-regiono kaj sur Giaŭdong-duoninsulo de Ŝandong fervore rakontis al la junuloj la vilaĝajn historiojn kaj la historiojn de la lokaj revoluciaj bataloj, por ke tiuj sciu, kiom da penoj kaj suferoj nia popolo travivis kaj kiel heroan batalon ĝi faris sub la gvido de Prezidanto Maŭ por renversi la reakcian regadon de imperiismo kaj la kuomintanga reakciularo kaj fine akiris liberiĝon.

Dank' al persistado ĉe la ĝenerala direkto de kombiniĝo kun la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, penado en kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong kaj energia strebado al remuldo de sia mondkoncepto, la vasta intelekta junularo irinta en la kampanoj kaj mont-regionon bone hardiĝis kaj multe progresis diversflanke kaj estas laŭdataj de la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. El la intelektaj junuloj kiuj fiksloĝiĝis en Ŝanhian-gubernio en la sudokcidenta parto de Ŝandong en 1964, 440 estas elektitaj kiel aktivuloj en kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong, kaj 214 kiel komunumanoj, junuloj aŭ milicianoj kun kvin bonoj.

PONTEGO DE LA TIANGIN-PUKOŬ-A FERVOJO SUPER LA NOVA BIAN-RIVERO FINKONSTRUITA

Pontego de la Tiangin-Pukoŭ-a Fervojo super la Nova Bian-rivero sur la Huajbej-a Ebenejo de Anhuj-provinco estis finkonstruita en junio de la kuranta jaro.

La konstruo de la Nova Bian-rivero estas ŝlosila parto de projekto por pliapaŝe elimini inundadon sur Huajbej-ebenejo laŭ la granda alvoko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ "Neprejngu Huaj-riveron". La fluejo de tiu rivero kunlongeco de pli ol 130 kilometroj komenciĝas de Tuo-rivero norde de la urbeto Suhian, trafluas la Tiangin-Pukoŭ-an Fervojon, Lingbi k. a. lokojn kaj fine enfluas en Hongze-lagon. La finkonstruo de la fervoja pontego super tiu rivero garantias, ke la rivero bone efikas kaj la fervojo funkcios senĝene dum la inunda sezono de la kuranta jaro.

La vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj kun senlima fideleco al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ firme decidis finkonstrui la pontegon antaŭ alveno de la inunda sezono kun la heroa spirito de transformo de la ĉielo kaj la tero. Oni komencis la konstruadon je la 15-a

de marto kaj finkonstruis la dutrakan pontegon 13-spanan kun la longeco de 260.18 metroj en la mallonga tempo de nur 85 tagoj, kaj la kvalito de la konstruo estas tute laŭnorma.

LA FINCA FRONTO DE ANŜUN BONE SUBTENAS AGRIKULTURON

La vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj sur la finca fronto de Anŝun-regiono, Gujĝoŭ-provinco, firme plenumis la grandan orientilon de Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion kaj stimuli la produkton**”, iris profunde en la agrikulturan plejfronton kunportante revoluciajn trezorajn librojn de Prezidanto Maŭ, energie propagandis la penson de Maŭ Zedong, disdonis kapitalon por subteno al agrikulturo surbaze de zorga enketado, kaj ĝustatempe helpis la produktajn brigadojn solvi la problemojn solvendajn en la produktado. Ĝis la unua tagdeko de majo, en la tuta regiono jam

estis disdonitaj 3,320,000 juanoj kiel pruntmono por agrikultura produkto kaj antaŭpago por agrikulturaj produktaĵoj aĉetotaj de la ŝtato. Laŭ statistiko pri Anŝun, Ĝenning kaj aliaj du gubernioj, 1,053 produktaj brigadoj aĉetis per la prunteprenita mono 1,484 plugbovojn kaj grandan kvanton da pumpiloj, gasolinmotoraj pumpmaŝinoj, norioj, plugiloj, erpiloj, kemia sterko k. a. produktaj rimedoj, kio forte antaŭenpuŝis la agrikulturan produkton.

ABUNDA RIKOLTO DE FRUMATURA RIZO SUR HAJNAN-INSULO

Direktate de la granda orientilo elmetita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion kaj stimuli la produkton**”, Hajnan-insulo akiris riĉan rikolton de frumatura rizo ankaŭ en la kuranta jaro, kaj en multaj el ĝiaj lokoj rimarkeinde pliiĝis la produktkvanto sur la bazo de la

*Ŝandong akiris riĉan rikolton de tritiko, kaj la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj revoluciaj kadroj rapide superplenumis la taskon de livero de somerrikoltaj grenoj al la ŝtato laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: “**sin Prepari al eventuala milito, sin prepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj servi al la popolo**”. La bildo montras la Ŝtatan Grenaĉetejon de Taj-erĝuang.*





Riĉa rikolto de printempaj kokonoj en Ŝiging-brigado de Kiantangiang-komunumo, Hajning-gubernio, Ĝegiang-provinco

riĉega rikolto de la pasinta jaro. Nun la revoluciaj komitatoj en diversaj niveloj estas gvidantaj la vastajn revoluciajn amasojn forte tenadi la klasan batalon, konduki longdaŭran kaj profundan amasan revolucion kritikadon kaj energie stimuli la somerajn rikoltadon kaj semadon. Post fundamenta plenumo de la rikolta tasko en Vanning, Lingŝuj k. a. gubernioj, kie la rikolta sezono estas pli frua, la vastaj amasoj de malriĉkmparanoj, malsuperaj mezkmparanoj kaj revoluciaj kadroj aktive sin ŝetis en produktan laboron por kulturo de malfrua rizo kaj levis altan tajdon de sterkopreparo, plugado kaj transplantado de rizplantoj.

ABUNDO DA FIŜOJ AKIRITA EN JANTAJ-REGIONO DUM LA PRINTEMPA FIŜSEZONO

La vastaj amasoj de fiŝistoj kaj revoluciaj kadroj de la popolaj komunumoj en la marborda regiono de Jantaj, Ŝandong-provinco, akiris senpre-

cedence riĉan rikolton de fiŝoj dum la printempa fiŝsezono. Ĝis la fino de majo, la kaptita kvanto estis 33.3 pli granda ol tiu de la sama periodo de la pasinta jaro.

Dank' al hardado en la granda proletara kultura revolucio dum la pasintaj du jaroj, multe altiĝis la konscio de la vasta fiŝistaro pri la klaso kaj la batalo inter la du linioj, kaj ĉiuj rigardas plenumadon de la granda orientilo de Prezidanto Maŭ "teni la revolucion kaj stimuli la produkton" kiel gravan signon de strikta sekvado de la granda strategia dispozicio de Prezidanto Maŭ. La membroj de la diversnivela revoluciaj komitatoj kaj gvidaj grupoj de produkto ĉiuj persone iris al la plejfronto de produktado, kune kun la fiŝistoj laboris surmare, studis verkojn de Prezidanto Maŭ, batalis kontraŭ egoismo kaj kritikis reviziismon, kaj tiamaniere akcelis la venkan disvolviĝon de la revolucio kaj produktado.



Angulo de Ĉaŭnej-bazaro de Flankmanĝaĵoj en Pekino

Ŝtofvendejo de Pinggu en antaŭurbo de Pekino akceptas ĉiutage nombregon da klientoj el la kamparaj komunumoj



Prosperere Disvolviĝas la Industria Produktado en Ŝanhajo

ŜANHAJO estas la plej granda industria bazo en nia lando. En la senprecedenca, granda proletara kultura revolucio, la ŝanhajaj laboristoj akiris brilajn venkojn unun post alia.

De la komenco de la nuna jaro, la totala valoro de la industria produkto de Ŝanhajo rekte leviĝis monaton post monato. Kuraĝigaj informoj pri sukcesoj venadis unu post alia. Sur la bazo de duobla venko en revolucio kaj produkto en la unuaj du monatoj, la proletaraj revoluciuloj kaj revoluciaj laboristoj kaj oficistoj sur la industria kaj trafika frontoj en Ŝanhajo gajnis en marto ree tre brillan venkon en produktado, tiel ke la produkto kreskis en granda mezuro. Kaj en aprilo, ili ankoraŭ pli streĉis siajn fortojn kaj pliiĝis la totalan industriaran produktan valoron multe super tiu en marto. Kaj tiu de majo estas je 11.6 procentoj pli granda ol tiu de aprilo kaj superis tiun de la respondaj periodoj en 1966 kaj 1967. Tio levis la nivelon de la ŝanhaja industria produkto al nova alteco. En metalurgia, maŝinkonstrua, kemia industrio kaj malpeza industrio inkluzive de la teksa troviĝas aro da fabrikoj, kiuj kreis la plej altan nivelon en produktado de post sia fondiĝo. La produktkvanto de la gravaj produktaĵoj bezonataj en la konstruado de la lando kaj en la vivo de la popolo, kiaj ŝtalo, ilmaŝinoj, elektraj motoroj, presita kaj tinkturita ŝtofo, kemiaĵo por agrikultura uzado, plasto, brakhorloĝoj, antibiotiko, bicikloj, kalcia karbido, papero, ampoloj k. a. grandmezure kreskis en majo kompare kun tiu en aprilo. Kaj en junio, la batalo por teni revolucion kaj stimuli produkton disvolviĝas pli energie kaj pli impete sur la industria kaj trafika frontoj en Ŝanhajo, kaj la situacio de produktado fariĝas ĉiam pli bona.


La apero de tiu bonega situacio sur la industria kaj trafika frontoj en Ŝanhajo estas granda venko de la penso de Maŭ Zedong. La penso de Maŭ Zedong senprecedence populariĝis en Ŝanhajo de la komenco de la granda proletara kultura revolucio. Armita per la penso de Maŭ Zedong, la ŝanhaja laborista klaso sukcesis fari tion, kio estis konsiderata neebla en la pasinteco; kaj iuj produktnormoj neatingitaj dum longa periodo estas jam nun rapide superitaj. Multaj ferŝtalaj fabrikoj en Ŝanhajo jam komencis grandkvante produkti ordinaran malalt-alojan ŝtalon, kies produkto nun estas plene forte disvolvata en nia lando. La provfabrikado de multaj novaj ŝtalspecoj kun superalta forteco, rezistemeco kontraŭ atmosfera korodo kaj malalta temperaturo kaj kompare pli bona kondukeco de magnetismo ankaŭ sukcesis sinsekve. El tiuj novaj ŝtalspecoj iuj estas uzataj en konstruado, ebligantaj ŝparon de duono de uzata ŝtalo, iuj estas uzataj por produkti kablonojn, ebligantaj plilongigon de ĝia uzperiodo al ĉirkaŭ duoblo, kaj iuj estas uzataj por fabriki elektrajn motorojn, ebligantaj multe malgrandigi ilian korpon. Kaj samtempe, la ŝtallaminata industrio en Ŝanhajo ankaŭ sukcesis en provfabrikado de multaj specoj de malregulformaj ŝtaloj kaj de ŝtaloj por speciala uzo, por kontentigi la bezonojn de industria kaj agrikultura produktado kaj nacidefenda konstruado.


En la Ŝanhaja Aloja Glitlagra Fabriko, la laborgrupo, kiu respondecas pri farado de krudaj formitaĵoj por glitlagroj, antaŭe povis produkti nur ĉ. 3,000 pecojn en unu deĵoro, kaj iuj opiniis ke la longe stagnanta produkt nombro estas nealtigebla pro la limigo de ekipaĵoj. Sed la laboristoj de tiu grupo fiere diris, ke maŝinoj estas malvivaj, sed homoj vivaj, kaj ke homoj armitaj per la penso

de Maŭ Zedong povas reformi masinojn. Ili batalis obstine kaj klopodis energie pri teknika renovigado. Kaj tiel ili kreis en majo la miraklon produkti 9,000 pecojn en unu deĵoro. Havenaj portistoj de Ŝanhajo ricevis en majo pezan taskon malŝarĝi fremdlandan ŝipegon, kiu portas 34,000 tunojn da varoj. Tia tasko estas malofta por la haveno. Krome, la ŝipo venis al Ŝanhajo ankoraŭ por la unua fojo, kaj ties strukturan aranĝon oni ne konis. Tamen, dank' al kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ, laborante kun penemo kaj sagaco, la laboristoj deŝipigis la tutan ŝarĝon en mallonga tempo de nur pli ol tri tagoj. En meza tagdeko de junio, la ŝanhajaj havenaj portistoj plenumis la taskon de deŝipigo de pezaj kaj grandaj ŝarĝaĵoj el la pola varŝipego "Zamenhof" en nur 20 horoj kaj 50 minutoj. La plenumo de simila tasko bezonus 5-6 tagojn por progresintaj havenoj en Eŭropo. Per tio ili sinsekve kreis la plej altajn rekordojn de rapideco de malŝarĝado en la haveno Ŝanhajo.

De la komenco de la nuna jaro, la proletaraj revoluciuloj kaj revoluciaj laboristoj kaj oficistoj sur la industria kaj trafika batalfrontoj en Ŝanhajo montris en la produkta batalo la heroismon konkuri kun tempo kaj premi ĉiujn malfacilojn sub la piedojn. La meznombra podejora produktkvanto de ŝtalo per oksigena procedo de la tria laborejo de konvertil-forno de la Unua Ferŝtala Fabriko de Ŝanhajo antaŭe ĉiam restis ĉirkaŭ 15 fornoj, tamen, je la antaŭvespero de la internacia laborista festo, ĝi subite leviĝis al 18 fornoj, kaj en la tago de la Maja Festo mem, ĝi saltis plie al 20 fornoj, al la nivelo senprecedence alta. La lastjara produkta nivelo de la 17-a Ŝtata Kotona Ŝpinteksejo superis tiun de la antaŭpasinta jaro, kaj kreis la plej altan rekordon en ĝia historio. Kaj en la nuna jaro, la produkto ĉiam kreskas monaton post monato, kaj la produkto de ĉiuj monatoj superis tiun de la respondaj periodoj en la pasinta jaro respektive. La vastaj revoluciaj laboristaro kaj oficistaro sin okupas energie en


Revoluciaj laboristoj kaj oficisto de la Ŝanhaja Fabriko de Neregulformaj Ŝaltuboj kontrolas specon de nerustiĝa ŝaltubo kiun oni sukcesis produkti en ĝi lastatempe.





Sub la gvido de la revolucia komitato, la dokistoj de la Ŝanhaja Haveno levis pli altan tajdon de tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto kaj kreis unun post alia novajn rekordojn en produkto.

Post dudek-monata luk-tado, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Ŝanhaja Fabriko de Ventoliloj sukcese fabrikis aksenfluan ventolilon kun reguligeblaj aloj de progresinta monda nivelo. La angulo de ĝiaj aloj estas ŝanĝebla dum funkciado de la maŝino kaj la maksimuma ventola volumeno estas duonmiliono da kubmetroj en ĉiu horo.




renovigo kaj revolucio de tekniko, kaj senĉese aperas novaj produktajtoj, teknologiaj procedoj kaj kreaĵoj. La nombro de novaj specoj de altnivelaj precizaj frotmaŝinoj, kiujn la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko sukcesis fabrikigi post provado de la jar-komenco ĝis nun, jam proksimiĝis al la sumo de la jaro 1966. La Ŝanhaja Dizela Fabriko uzis nur kelkajn monatojn por konstrui altpreman olepumpilon kun internacia progresinta nivelo, kiun ĝi malsukcesis fari dum tre longa tempo antaŭ la granda proletara kultura revolucio.

La proletaraj revoluciuloj kaj revoluciaj laboristoj kaj oficistoj sur la industria kaj trafika batalfrontoj en Ŝanhajo aktive respondas la grandan alvokon elmetitan de Prezidanto Maŭ: **“plie ŝparu en faro de revolucio”**. Multaj fabrikoj elfosis latentan forton, renovigis teknikon, kaj plenumis aŭ superplenumis sian produktan taskon, postulante de la ŝtato malmulte aŭ neniom da distribua karbo. Kaj de la komenco de la nuna jaro, la sukceso atingita de la industria batalfronto de Ŝanhajo en ŝparado de karbo estas senprecedenca.



Sub la direktado de la granda orientilo de Prezidanto Maŭ “teni la revolucion kaj stimuli la produkton” la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Ŝtata Dua Prestinktura Fabriko de Ŝanhajo senĉese antaŭensaltegas en produktado. Kun la antaŭensaltego plimultiĝis la specoj de tinkuritaj ŝtofoj. Jen amasoj de prestinkuritaj ŝtofoj.



La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Kvina Ŝarĝ- kaj Malŝarĝ-Grupo de la Tria Laborsekcio de la Ŝanhaja Haveno kondukas amasan kritikon antaŭ la dejora horo.

La Prosperantaj Stepoj de Interna Mongolio

LA stepoj de Interna Mongolio estas la ĉefa brutbreda regiono de nia lando. La granda proletara kultura revolucio, persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ, akcelis ideologian revolucion ĉe la diversnacieca popolo de Interna Mongolio kaj plie alportis novan disvolviĝon de la brutbredado. Nun, de la montĉeno Granda Hing-anling en oriento ĝis Helan-montaro en okcidento, ĉie regas prospero.

En 1967, oni sukcesis ricevi 11 milionojn da novenaskitaj brutidoj en Interna Mongolio kaj kreis la plej altan rekordon de la procentoj de vivipovaj bestidoj en la historio. Dekalkulinte la brutojn venditajn al la ŝtato kaj distribuitajn al la komunumanoj por manĝado, la totala nombro de bredataj brutoj en la tuta Aŭtonoma Regiono pliiĝis je 1,570,000 kompare kun tiu de 1966. La nombroj de ĉevaloj kaj muloj pliiĝis je 8% kaj 15% respektive, kaj tiuj de la famaj ĉevaloj kaj bovoj de Sanhe kaj ŝafoj de bonkvalita lano pliiĝis je 23%.

En la tagoj de senprecedence flugrapida disvolviĝo de brutbredado, kio la unua venis al la kapo de la diversnacieca popolo de Interna Mongolio, estis vendi al la ŝtato siajn plej bonajn brutojn kaj brutproduktaĵojn por subteni la socialisman konstruadon de la patrio. En la jaro 1967, la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio vendis al la ŝtato, krom grandaj nombroj da feloj kaj lano, ankaŭ 3,800,000 grandajn brutojn taŭgajn por manĝado aŭ por uzado de la brigadoj de popolaj komunumoj.

La teritorio de Interna Mongolio ampleksas 1,400,000 kvadratajn kilometrojn. Pli ol duono

de ĝia teritorio estas stepoj, kiuj formas vastan fekundan paŝtejon. Tamen, antaŭ la Liberiĝo, sub la kruela prirabado fare de la imperiismo, reakcia registaro de Kuomintango, princoj, nobeloj, feŭdataj brutposedantoj kaj superaj lamaoj, la nombroj de bredataj bovoj, ŝafoj, muloj kaj ĉevaloj malpliiĝis jaron post jaro. Kiam liberiĝis Interna Mongolio en 1945, la nombro de brutoj estis je 18.8% malpli ol tiu de 1936, la plej granda nombro antaŭ la Liberiĝo. Post la demokratia reformo, socialisma transformo, socialisma edukado kaj aliaj amasaj revoluciaj movadoj, liberiĝis la produktaj fortoj kaj la paŝtistoj ekhavis veran garantion en sia produkto kaj vivo. En 1967, la nombro de brutoj pliiĝis per trioblo kompare kun tiu antaŭ dudek jaroj, kiam la Aŭtonoma Regiono fondiĝis. Tio ja estas vere granda disvolviĝo.

Ĉio ĉi tio rezultiĝis de tio ke la diversnacieca popolo firme iris la socialisman vojon sekvante Prezidanton Maŭ. Sed, de tre longa tempo, la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Interna Mongolio oponis la ruĝan standardon flirtigante ruĝan standardon. Ili buŝe parolis ankaŭ pri socialismo, sed fakte plenumis cent-pocentan reviziisman linion kaj provis restarigi en Interna Mongolio kapitalismon, por revenigi la malnovan socion, en kiu homoj manĝis homojn. En 1966 nia granda instruanto Prezidanto Maŭ klarionis la batalkomencon de la granda proletara kultura revolucio kaj komplete frakasis la belan sonĝon de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Interna Mongolio. Kaj ilia krima intrigo bankrotis.

La granda disvolvigo de brutbredado sur la stepoj de Interna Mongolio en 1967 estis atingita ne sub favoraj kondiĉoj naturaj. Ĉar serioza sekeco ĉiam minacis la stepojn en la lastaj jaroj, kaj cetere iuj lokoj estis atakitaj de maloftaj neĝoŝtormoj, kiuj donis serioze malfavoran influon al la kreskado kaj sano de brutoj kaj tiel alportis grandan malfacilaĵon al la brutbredado.

Tamen la jaro 1967 estis la jaro, en kiu la granda proletara kultura revolucio akiris decidan venkon en Interna Mongolio. La vastaj revoluciaj paŝtistaj amasoj sin ĵetis en la akran klasbatalon kaj transformis sian revolucion sentiman spiriton vekitan de tiu batalo en potencaĵon materian forton por venki ĉiujn malfacilaĵojn. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **“teni la revolucion kaj stimuli la produkton”**, ili sin apogis sur la forto de kolektiva ekonomio de la popola komunumo kaj disvolvis amasan movadon, por fosi putojn kaj irigaciajn kanalojn kaj kulturajn paŝtherbojn kaj aliajn furaĝplantojn, kaj samtempe disvastigis la progresintajn metodojn de rekonstruado de staloj, protektado de brutoj, preventado de brutaj malsanoj kaj plibonigo de la maniero de paŝtado kaj bredado.

Nun la totala areo de paŝtejoj jam multe superis tiun de 1966, t. e. 125,000 hektarojn. Pro tio multaj komunumoj jam povas parte aŭ fundamente sin provizi mem per propraj paŝtherboj en vintro kaj en printempo. Krome la paŝtistoj plantis multe da arboj kaj laŭplane kulturis herbsemojn sur la stepoj. La nombro de staloj nove konstruitaj superis tiun de 1966, cetere, en pli bona kvalito.

Estis fositaj pli ol 50,000 putoj en 1967, kaj tio solvis la problemon de akvumado por vastaj areoj de stepoj kaj paŝtherbaj kulturejoj kaj de trinkado de la brutoj. Antaŭe la brutoj trinkis starantan akvon el lagetoj, nun ili povas kvietigi sian soifon per freŝa akvo el putoj.

En la jaro 1967 oni faris al brutoj 150 milionojn da inokuloj, tiel ke la epidemioj de la brutoj estas limigitaj.

Ĉiuj tiuj plenumitaj laboroj kreis gravajn kondiĉojn por disvolvi la brutbredadon.

La pli granda garantio por duobla venko de revolucio kaj produkto de Interna Mongolio estas ke la vasta revolucia paŝtistaro kreive studas kaj kreive aplikas la penson de Maŭ Zedong. Ĉie ajn kaj en ĉiu ajn ĵurto (mongola tendo) sur la vastaj stepoj, oni povas trovi sur muro portreton de Prezidanto Maŭ kaj en loĝejo liajn verkojn. Ves-

pere ĉiuj en la familio kune diskutas aŭ legas la *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* aŭ aŭskultas disaŭdigojn de la Centra Popola Radio-Stacio kaj de la lokaj radio-stacioj. Kiam dumtage la paŝtistoj rajdante eliras por paŝti, ili ĉiuj portas kun si en la poŝo la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* por legi kaj studi ĝin sur stepo.

Sur la stepo Hulunbujr en Maldekstra Nova Balku-flago formiĝis 600 grupoj por studi verkojn de Prezidanto Maŭ kun 13,000 partoprenantoj. Tiaj grupoj nun plimultiĝas tago post tago. En la pasinteco, la paŝtistoj kutime salutis inter si per la frazoj, unue: kiel vi fartas? due: kiel vivas viaj brutoj? trie: kiel statas la paŝtejo? Tiuj kutimaj diroj de la paŝtistoj hereditaj de generacio al generacio, estas nun anstataŭitaj per la nova, pli nobla: Kiel iras via studo pri verkoj de Prezidanto Maŭ?


Rimarkindajn rezultojn de kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ oni vidas inter la paŝtistoj. Sur la stepoj de Interna Mongolio cirkulas multaj kortuŝaj rakontoj radiantaj de la penso de komunismo: ekzemple, fari-





La familia de la malriĉa paŝtisto Sugejima de Hainharba-komunumo, Hubepŝar-flago, Silingol-ligo, Interna Mongolio, senlime amas Prezidanton Maŭ. Jen la tuta familia studas verkon de Prezidanto Maŭ.

Ŝafaro de Bajan-ula-brigado de la popola komunumo Ruĝas Oriento, Okcidenta Flago, Interna Mongolio.




ekstran laboron sen rekompenco, memvole preni sur sin pli pezan laboron, tutkore kaj tutanime dediĉi sin al la komunumo, al la kolektivo kaj meti la komunajn interesojn sur la unuan lokon. Tia disvolvo de komunisma spirito estas potenca movforfo por rapidigi la disvolvadon de la kolektivisma ekonomio. Ekzemple, en Cinkel-komunumo, sur la stepo Silingol, estas deknaŭ-jara knabino nomata Sajvilma, kiu luktis kontraŭ neĝoŝtormo tri sinsekvajn tagnoktojn por sekurigi la ŝafojn, kiujn ŝi paŝtis por la komunumo. Kiam la vojo estis ekstreme malfacila, tio, kion ŝi pensis, estis nur la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, defendo de lia revolucia linio, la revolucio kaj

batalo por protekti la kolektivajn havaĵojn. Tial ŝi havis senfinan kuraĝon. Fojo post fojo ŝi recitis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ: **“Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon.”** Fine ŝi venkis la neĝoŝtormon kaj sukcesis en protektado de la ŝafoj de la popola komunumo.

Sur la stepoj de Interna Mongolio, la paŝtistoj nun laboras entuziasme por akiri pli grandan disvolvon de brutbredado en 1968. La brutoj estas pli sanaj, la brutidoj estas pli prosperaj kaj la revolucia entuziasmo de la paŝtistoj estas pli granda. La stepoj de la tuta Interna Mongolio vivplene marŝas al nova venko.

Grasaj ĉevaloj en paŝtado sur la paŝtejo de Abaga-flago, Silingol-ligo, Interna Mongolio.



Iom pri la Fiŝbredado en la Trapa Lago

EN la baseno de Taj-lago de nia lando estas reto de riveroj kaj densa aro da grandaj kaj malgrandaj lagoj interligitaj. Tie ne nur sin trovas mekanika irigacia reto, sed ankaŭ fame konata fiŝbredejo.

La tieaj komunumanoj okupiĝas pri kulturado de trapo kaj fiŝbredado en la riveroj kaj lagoj per boatoj. Dum longa laborado ili kreis du metodojn de fiŝbredado. Unu estas nomata malferma bredado, t. e. bredi fiŝojn en rivero aŭ granda aŭ malgranda lago kun areo de dekoj, centoj, eĉ miloj da muoj. La alia estas nomata ferma bredado, t. e. bredi fiŝojn en lageto kun areo de kelkaj muoj. La ok popolaj komunumoj sub la distrikto de la Trapa Lago de Vuhing-gubernio, kiujn ni vizitis, estas unu el la ĉefaj lokoj de ferma fiŝbredado de Ĝegiang-provinco sude de Taj-lago.

Kiam ni venis al la distrikto de la Trapa Lago, la komunumanoj sin okupis ankaŭ per fiŝkaptado el la lagetoj, krom per kolektado de morusfolioj kaj mastrumado pri rizkampoj. La fiŝkaptantoj kun kelkaj boatoj en grupeto ĵetis reton, formis per ĝi duonringon etendiĝantan de unu ekstremo al alia de la lageto, kaj poste iom post iom formis kaj malvastigis la ringon. Malpli ol duonhoron poste oni levis la pezan reton sur la akvosurfacon kaj ŝutis la svarmon da vigle saltantaj fiŝoj pezantaj po dekelkajn ĝinojn en la holdojn.

La ĉefaj specioj de la fiŝoj bredataj ĉe la Trapa Lago estas la bonegaj specioj originalaj de Ĉinio, kiaj nigradorsa fiŝo (*Mylopharyngodon piceus*) herba fiŝo (*Ctenopharyngodon idellus*), dikkapa fiŝo (*Hypophthalmichthys molitrix*), belmakula dikkapa fiŝo (*Aris-*

tichthys nobilis) kaj krome ankaŭ karmo (*Cyprinus carpio*), karaso (*Carassius auratus*) platfiŝo (*Parabramis pekinensis*), kvadrata fiŝo (*Megalobrama terminalis*) ktp. Kvankam la fiŝbredado en sensala akvo de tiu loko jam havas historion de pli ol mil jaroj, tamen antaŭ la Liberiĝo estis tre postiĝintaj la fiŝbredado kaj fiŝkaptado de la vastaj amasoj de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj sub la kruelaj ekspluatado kaj subpremado fare de la bienularo.

Tiam la fiŝistaj familioj havis nur po kadukan boaton kun multe flikita reto kaj tutjare vagadis surakve kun la boato kiel sia hejmo. Post la Liberiĝo, la laboranta popolo emancipiĝis kaj fariĝis la mastro de la ŝtato sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio kaj adiaŭis por eterne la suferplenajn tagojn. Precipe post komunumigo en 1958, la komunumanoj marŝas antaŭen per grandaj paŝoj laŭ la vojo de kolektivigo, tute noviĝis la spirita fizionomio de la homoj kaj sekve estiĝis tre prospera sceno en la tiea fiŝbredado en sensala akvo.

La unua ŝlosila problemo solvenda post komunumigo estis tiu pri unueca administrado kaj rearanĝo de la fiŝbredaj lagetoj. Antaŭe, la fiŝlagetoj de la kooperativoj ne interligiĝis unu kun alia kaj tio estis tre maloportuna por kolektiva bredado kaj kaptado. Post fondo de la popolaj komunumoj, oni redividis la fiŝbredajn lagetojn kaj solvis la problemon tiel, ke ĉiu produkta taĉmento havas siajn interligitajn bredejojn. Dank' al tio, oni povas ŝpari nemal multe da laborforto kaj tempo por kontrolado pri kreskado de la fiŝidoj kaj eli-

minado kaj prevento de malsanoj kaj malutilaj insektaĉoj de la fiŝoj. La produktkvanto de fiŝoj kreskis jaron post jaro. Antaŭ komunumigo, Baŭfeng-brigado de Donglin-komunumo povis kapti nur pli ol 100 kilogramojn da fiŝo el ĉiu muo da fiŝbredejo en riĉrikolta jaro, sed en 1967 ĝi kaptis pli ol 300 kilogramojn el ĉiu muo, kio estas produktkvanto malfacile atingebla antaŭ komunumigo.

Alia ŝlosila problemo solvita post komunumigo estas tiu de fiŝidoj en fiŝbredado en sensala akvo. La laboranta popolo de la distrikto de la Trapa Lago havis tradician kutimon "ne kulturi fiŝidojn por fiŝbredejo". Oni kutime aĉetis fiŝidojn de lokoj kiaj Vuhan kaj Giugiang en la baseno de Jangzrivero kaj ilin portis al la bredejoj. Ĉiujare, oni sendis homojn por aĉeti fiŝidojn kaj la longa vojaĝo bezonis minimume 1 kaj maksimume 2-3 monatojn. Sufiĉe granda nombro da fiŝidoj mortis dum la longdistanca transportado, kio rekte reduktis la produktkvanton de fiŝoj kaj la enspezon de la kooperativanoj. Baldaŭ post la sukceso de Kan-

tono en arta elkovo de fiŝidoj en 1958, ankaŭ ĉe la Trapa Lago oni sukcesis, unuafoje en la historio, en arta elkovo de fiŝidoj aŭtune de la sama jaro. En la jaro 1960, la ok popolaj komunumoj de tiu distrikto jam povis produkti fiŝidojn ne nur sufiĉajn por sia propra bezono, sed ankaŭ superbezonaĵojn por helpi alilokajn bredistojn. En la jaro 1967 sola, ili subtenis fratajn unuojn per centmiljonoj da fiŝidoj kaj pli ol dekmiljonoj da generaj fiŝoj.

De la lasta vintro kaj la ĉijara printempo, la vastaj amasoj de la fiŝistoj ĉe la Trapa Lago aplikis en la produktado siajn vigloplenajn entuziasmon kaj energion vekitajn en la granda proletara kultura revolucio, pliprofundigis kaj plivastigis la fiŝbredadajn lagetojn spite al frosta vento, kun la spirito de Daĝaj-brigado sin apogi sur la propraj fortoj. Pluraj komunumoj ankaŭ sin okupas pri studo pri bredado de novaj specioj de fiŝoj kaj nova scienca metodo de fiŝbredado. Ankoraŭ pli bela estos la estonto de la fiŝbredado en sensala akvo en la distrikto de la Trapa Lago.



Membroj de Hanhi-komunumo ĉe la Trapa Lago en fiŝkaptado.

Laŭ la socialisma direkto montrita de Prezidanto Maŭ, la popola komunumo Dongbejvang en antaŭurbo de Pekino iras senŝanceliĝe la vojon de agrokultura kolektivigo. En la batalo inter la du klasoj kaj du vojoj en la kamparo, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj firme defendis la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj frakasis la kriman intrigon de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en tiu popola komunumo por restaŭro de kapitalismo. En la granda proletara kultura revolucio, ili levis novan altan tajdon de kreiva studo kaj kreiva aplikado de la penso de Maŭ Zedong kaj batalakiris duoblan venkon de revolucio kaj produkto.

En la pasintaj dek kelkaj jaroj, la popola komunumo Dongbejvang ĉiam pli bone manifestis sian potencon vivforton kaj senkomparan superecon en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj sciencaj eksperimentoj. La produktokvanto de tritiko en la kuranta jaro kreskis ĝis sepoblo de tiu antaŭ la starigo de la komunumo, kaj ankaŭ tiu de aliaj plantaĵoj kreskis ĝis duoblo aŭ pli. Per sia forto de kolektiva ekonomio, la vasta membraro de la komunumo konstruis irigaciajn kanaletojn kaj ŝanĝis grandan areon da neirigaciata tero en rizkampojn, kiuj povas doni riĉan rikolton tiel en jaro de trosekeco kiel en jaro de inundo. Krome, estas starigitaj ankaŭ traktora laborgrupo, bredejo de laktbovinoj kaj malgrandaj fabrikoj, kaj ĉiu el ĝiaj produktaj brigadoj havas porkobredejon. Per tio oni produktas riĉaĵojn por la ŝtato, la kolektivo kaj la komunumanoj.

Kun alta fervoro, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la popola komunumo Dongbejvang nun luktas por akiri novajn venkojn!

Propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong faras prezentadon surkampe dum laborpaŭzo.





La Popola Komunumo Dongbejvang dum Somera Riko

(*Maldekstre*) Riĉa rikolto de tritiko

(*Dekstre supre*) La popola komunumo starigis ĝenerale semproduktajn kampojn. Jen la knabinoj ekzamenas de spikoj en tia kampo.

(*Dekstre sube*) Angulo en la paperfarejo de la komunumo



olto

kreskadon






La kanaletoj tra l' kamparo certigas riĉan rikolton en ĉia jaro.

Porkobredejo de unu el ĝiaj brigadoj

Laktbovinoj de la komunumo



Medicina Taĉmento

Aktivanta en la Regiono

de Kimen-monto

POST la alpreno de potenco, la proletaraj revoluciuloj de Huaŝan-hospitalo de la Ŝanhaja Unua Medicina Instituto ekmetis la gravitan punkton de sia medicina laboro al la kamparo laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ. En junio 1967, la unua medicina taĉmento konsistanta el 23 junaj medicinaj laborantoj ekiris al la regiono de Kimen-monto en suda Anhuj.

De unu jaro ili manĝas, loĝas, laboras kaj lernas kune kun tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj starigis profundan klasan amikecon kun ili. La unua afero, kiun la medicina taĉmento faris post sia alveno al la montregiono, estis propagandi la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong, kaj ĉiuj ĝiaj membroj fariĝis propagandistoj. Ili modeste lernis de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj disvolvis kune kun ili revolucionan amasan kritikon. Tiucele ili okazigis kunvenojn ĉe kamprando dum laborpaŭzoj, eldonis specialan murgazeton kaj okazigis grandajn kunvenojn por kritiki kaj akuzi la ĝisĉielan krimagon de restaŭro de kapitalismo en la kamparo fare de la ĉina Ĥruŝĉov. Ili fervore servis al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Sub la kondiĉoj de simplaj ekipaĵoj, ili plene disvolvis sian subjektivan aktivecon, sume savis pli ol 80 grave malsaniĝintajn pacientojn, faris operaciojn por pli ol 500 malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kuracis

malsanon por pli ol 4,000 personoj, kaj pro tio akiris varman bonvenigon de tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

“BONAJ KURACISTOJ SENDITAJ DE PREZIDANTO MAŬ”

Inter la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en la montregiono cirkulas multaj kortuŝaj rakontoj pri la tutkora servado al la popolo fare de la medicina taĉmento.

La 24-an de februaro, ĉijare, la medicina grupeto kiu laboris en Likou ricevis urĝan informon, ke malriĉkamparano de Ĝengzong-brigado Lin Junĉang grave malsaniĝis kun danĝero de morto. Ĝengzong-brigado de Likou-komunumo troviĝas en la plej malproksima izolita montvilaĝo. Por ĝin atingi oni bezonas piediri pli ol 12 kilometrojn da montvojeteto. Kaj jam estis vespero, kiam la medicina grupeto ricevis la informon. Sed ĉion ĉi tion la kamaradoj de la medicina grupeto tute neglektis. Spite al la laciĝo de daŭra batalado dum kelkaj tagoj, du kamaradoj de la grupeto estis tuj senditaj tien kun medicina kesto. Atinginte la celokon, ili trovis, ke pro tro multa sangsputo la malsanulo jam estas en vivdanĝero. Necesis fari por li operacion. Ili tuj revenis senprokraste al la restadejo en la sama nokto por fari preparadon. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **“ne fari senpreparan batalon”**, la kamaradoj de la medicina grupeto



Kuraca grupo faras operacion por malriĉkampanino suferanta de akuta galvezikito.

tuj faris urĝan spiritan mobilizon kaj materian preparon. Ĉiuj sinĵetis tutkore en la batalon por savi la malriĉkamparanon.

Antaŭ la operacio ĉe la malsanulo aperis serioza fenomeno de ŝoko, kaj estis necese tuj transfuzi al li sangan. En tiu kriza momento, la sango de kamaradoj de la medicina taĉmento kunfluiĝis refoje kun tiu de malriĉkamparano. Post la transfuzo, iom post iom leviĝis la sangpremo de Lin Junĉang, kaj la stato de la malsanulo rapide pliboniĝis. Tuj poste ili faris por li operacion de ĉirkaŭligo de la fendita vejno de ezofago. Dank' al la senprokrasta kuraco kaj zorgema flegado Lin Junĉang eldanĝeriĝis. Kun larmoj en la okuloj, la malsanulo ne povis eldiri eĉ unu vorton pro emociiĝo.

Alia cirkulata rakonto temas pri reaktiro de vidkapablo de iu blindulo. En Luli-brigado de Ĉeng-an-komunumo estas iu pli ol 70-jara malriĉkampanino, kiu suferis maljunaĝan katarakton

kaj perdis sian vidkapablon jam pli ol 10 jarojn. Antaŭ la Liberiĝo, tiu avino multe suferis la kruelan ekspluaton kaj subpremado de bienulo. Post la Liberiĝo ŝi fariĝis mastro de sia sorto sub la gvidado de Prezidanto Maŭ. Kiom ŝi sopiris vidi nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ! Post sia alveno al la montvilaĝo, la medicina taĉmento tuj vizitis ŝin, kaj tio kortuŝis ŝin ĝis larmo. Post nelonge la medicina taĉmento faris por ŝi operacion. Je la tria tago, kiam la bandaĝo estis forprenita de ŝiaj okuloj, je la unua rigardo ŝi tuj vidis la portreton de Prezidanto Maŭ. Ŝi tiom emociiĝis, ke la okuloj fariĝis plenaj de larmoj, kaj ŝi havis en sia koro milojn kaj milojn da vortoj por diri. Nereteneble ŝi kriis: "Vivu Prezidanto Maŭ! Longe vivu Prezidanto Maŭ!" De tiam ĉiufoje, kiam ŝi renkontas kamaradojn de la medicina taĉmento, ŝi prenas ilian manon kvazaŭ vidante parencojn, kaj intime nomas ilin "bonaj kuracistoj senditaj de Prezidanto Maŭ".

ILI FARAS KREIVAN LABORON

Post unujara praktikado, la kamaradoj de tiu medicina taĉmento de Huaŝan-hospitalo plie komprenis la grandan signifon de la instruo de Prezidanto Maŭ pri higiena laboro. Ĉi tie ili faris kreivan laboron kaj malfermis vojon por servi al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkampanoj en montregiono.

El sia praktika sperto, ili profunde konvinkiĝis, ke la tuta sistemo de ekzamenaj kaj kuracaj metodoj uzataj en urbaj hospitaloj tute ne taŭgas por la kamparo. Konforme al la bezonoj de montregiono, ili efektivigis la sistemon de unuiĝo de kuracado kaj flegado, kombiniĝo de la ĉina kaj okcidenta medicinaj kaj kapabliĝo en kelkaj aliaj fakoj krom en la speciala. Krome, ili metis la gravitan punkton de sia laboro en la kuracadon kaj esploron de ofte renkontataj kaj multfoje okazantaj malsanoj en la kamparo. Nun ĉiuj flegistoj kapablas fari operacion por apendicito,

hernio kaj aliaj oftaj malsanojen la montregiono, kaj eĉ apotekisto povas kuraci oftajn malgravajn malsanojn.

Ili plene frakasis la kuracstilon de la burĝaro kaj prenas kamaradon N. Bethune kiel brillan ekzemplon por tutkore kaj tutanime servi al malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj. Sub la malfacilaj kondiĉoj en la montregiono, ili firme kredas, ke en la unua loko estas la homa faktoro, plene disvolvis subjektivan aktivecon kaj venkis diversajn malfacilojn en materiaj kondiĉoj. Ili praktike prenas urĝa tion, kio urĝas al malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj kaj helpas ilin en tio kion ili aparte bezonas. Pro manko de oksigeno, ili helpis al malsanulo en kazo de neceso spiri buŝo kontraŭ buŝo; kiam malsanulo bezonas transfuzon, ili konkure oferas sian freŝan sangon al la klasa frato; kiam mankas al ili instrumentoj, ili ĉiurimede klopodas eltrovi anstataŭajn rimedojn... Pro ilia alta devkonscio en laboro, la procento de infektiĝo en 500 grandaj kaj malgrandaj operacioj, kiujn ili faris, estas eĉ malpli alta ol tiu de iuj grandaj hospitaloj en urboj. Tiu viva fakto pravas, ke agante laŭ la penso de Maŭ Ze-

dong, oni povas venki ĉiujn malfacilojn kaj fari kion la antaŭuloj ne povis.

Krome la kamaradoj de la medicina taĉmento ĉiam kaj ĉie pensas pri kaj kalkulas por malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj. Por redukti la suferon de malsanuloj, ili persiste praktikas kuracan rondiradon kaj ĝisdoman alporton de medikamentoj al pacientoj. Ili cetere instruas al malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj la uzadon de lokaj kuracherboj por kuraci iujn malsanojn kaj tio donas grandan oportunon al la amaso. La medicina taĉmento ankoraŭ trejniĝis por ili pli ol 40 sanitaristojn, kiuj jam povas kuraci ordinarajn, malgravajn vundojn kaj malsanojn.

SERVI AL MALRIĈKAMPARANOJ KAJ MALSUPERAJ MEZKAMPARANOJ DUM LA TUTA VIVO

La kamaradoj de la medicina taĉmento venis de granda urbo al montregiono, kie la vivkondiĉoj estas kompare malfacilaj, kaj la cirkonstancaro estas multe diferenca. Ĉu ili povas rapide adaptiĝi al la vivo de la montregiono? Ĉu ili povas tut-

La 70-jara malriĉkamarano avino blindiĝis antaŭ dekkelkaj jaroj kaj nun reakiris vidkapablon dank' al laboro de la kuraca taĉmento. Kun forta emocio tenante la manojn de kamarado el la taĉmento ŝi diris: "Dan-kojn al vi bonaj kuracistoj alsenditaj de Prezidanto Maŭ!" Kaj tiu diris emociite: "Ni devas danki la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ! danki la Komunistan Partion!"



kore servi al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj? Serio da provoj prezentiĝis antaŭ ili. La junaj medicinaj laborantoj harditaj en la granda proletara kultura revolucio faris klaran respondon per sia agado. Dum la jaro, sub la lumo de la penso de Maŭ Zedong, ili disvolvis la revolucion spiriton kuraĝi batali kaj kuraĝi venki kaj atingis iujn sukcesojn en servado al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj; samtempe tio akcelis revolucion en ilia ideologio, tiel ke inter ili senĉese aperis bonaj faroj kaj bonaj homoj.

En tiu ĉi medicina taĉmento estas ĥirurgo, kiu laboris tri monatojn en montregiono, estante mem malsana kaj prenante sur sin la pezan taskon de operaciado. Ĝuste kiam la laboroj peze amasiĝis, li ekhavis malsanon en la hepato. La aliaj kamaradoj multfoje admonis, ke li ĉesu fari kuracon ĉe pacientoj, sed li persiste daŭrigis vizitadon al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por kuraci ilin kaj alporti medikamentojn. Iufoje, por savi virinon en nenormala akuŝado, li piediris dekojn da lioj kaj transgimpis la 1,500 metrojn

altan monton Daĉiling. Lia sindonema spirito en laboro profunde kortuŝis la aliajn kamaradojn. Kiam tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj maltrankviliĝis pro lia sano kaj admonis lin bone ripozi, li ĉiam diris: "Mi estas kuracisto, kaj pli grave por mi estas kuraci malsanulojn." Poste lia malsano pligraviĝis, la kamaradoj de la medicina taĉmento decidis sendi lin al Ŝanhajo por plia ekzamenado. Ĉe la adiaŭo por li tre ĉagrena, li diris al la kamaradoj: "Resaniĝinte mi tuj revenos. Mi devas kontribui mian parton en la servo al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj." La mallongaj frazoj esprimis lian profundan klasan amon al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Nun nemalmultaj kamaradoj de la taĉmento jam decidis fiksloĝi en la montregiono por servi al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj dum la tuta vivo. Ili solene ĵuris al Prezidanto Maŭ ke firme sekvante la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ ili faros la revolucion ĝis la fino sen returno.

Dum sia rondirado en la kamparo por plenumi sian taskon, la membroj de la kuraca taĉmento propagandas la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj la grandan proletaran kulturalan revolucion al la kamparanoj profitante la laborpaŭzojn.



Kiel Mi

Kuracis Mutulojn

ARMEANIĜINTE en 1964, mi fariĝis sanitaristo en nia sanitara grupo. En aŭgusto 1966 mi venis al la kamparo kune kun nia trupo. Iutage ni partoprenis kunvenon okazigitan de komunmanoj por interŝanĝi spertojn en kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong por elimini egoismon kaj starigi kolektivismon. Kiam ni laŭte kantis kanton kun teksto de vortoj de Prezidanto Maŭ, mi trovis apud mi 14-15-jaran knabon, kiu nur rondigis siajn okulojn sed ne malfermis la buŝon. Opiniante ke li ne scipovas kanti tiun kanton, mi do volis instrui lin. Kiam mi alparolis lin, mi tuj konstatis ke li estas mutulo. En la kunveno multaj fervore rakontis emociajn okazaĵojn koncerne al elimino de egoismo kaj starigo de kolektivismo laŭ instruo de Prezidanto Maŭ. Kvankam kun oreloj kaj buŝo, tamen, la knabo ne povis aŭdi instruojn de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ nek eldiri sian senliman amon al li. Kia sufero tio devas esti por li! Kiel medicina laboranto mi havas la naturan devon ĉiam pensi pri la suferoj de pacientoj.

Poste iu surdmutulo venis al nia sanitara grupo por peti kuracon. Mi rifuzis lian peton, ĉar mankis al mi sperto de kuraco de surdmutulo. Post la

forsendo de la paciento, disvolviĝis intensa pensbatalo en mia cerbo. Kiel mi, revolucia medicina laboranto, povas rigardi senfare la suferon de klasaj gefratoj? Mi malfermis la libron *Servu al la Popolo*, en kiu Prezidanto Maŭ skribis: **Niaj trupoj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo, kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo.**” Komparante mian agon kun la instruo de Prezidanto Maŭ mi sentis tre grandan honton. Sub la inspiro de la penso de Prezidanto Maŭ **ekskluzive** kaj **senrezerve** servi al la popolo, mi faris firman decidon preni la grandan internacisman batalanton Bethune kiel brilan modelon por nepre venki ĉiujn malfacilojn kaj kuraci surdmutulojn.

Kvankam la decido estis farita, tamen antaŭ mi kuŝis efektive multaj malfaciloj. Antaŭ la armeaniĝo mi okupis min nur pli ol unu jaron pri preparado de medikamentoj uzataj en la ĉina tradicia medicino kaj havis iajn sciojn pri akupunkturo, sed neniam kuracis malsanulon, des pli ne surdmutulon. Poste mi aŭdis ke en la urbo de la gubernio estas maljunaj kuracistoj de la ĉina tradicia medicino kun riĉa sperto en akupunkturo, mi do iris por peti konsilojn. Ili diris: “Ni okupiĝas pri akupunkturo jam de 30-40 jaroj, sed neniam kuracis mutulon.” Tiu respondo kvazaŭ verŝis al mi pelvon da malvarma akvo.

*La verkinto estas sanitaristo de iu trupo de la Aera Armeo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

La sekretario de la partia filio Sang Ŝenghua rimarkis mian ĉagrenon kaj instigis min studi verkojn de Prezidanto Maŭ kun mia problemo. Li diris: “Tio ne estas simple por kuraci malsanon sed ankaŭ por proklami batalon kontraŭ akademiaj ‘aŭtoritatuloj’ de la burĝaro.” Sub la inspiro de kamarado Sang, mi denove studis instruon de Prezidanto Maŭ: “**Ni povas ellerni kion ni ne komprenis antaŭe. Ni bone kapablas ne nur detruigi la malnovan mondon, sed ankaŭ konstrui la novan.**” La vortoj de Prezidanto Maŭ tuj vigligis mian spiriton. Por revoluciaj batalantoj de la epoko de Maŭ Zedong neniu fortikaĵo estas nekonkerebla kaj neniu altaĵo neatingebla. Mi volis forigi la suferojn de surdmutuloj per ĉiuj rimedoj. Mi volis elhaki vojon firme apogante min sur la penso de Maŭ Zedong.

Entute estas pli ol 30 punktoj sur la homa korpo havantaj rilaton kun kuraco de surdeco kaj muteco. Sed kie estas la esence gravaj punktoj? Kiel mi povos trovi tiujn punktojn? Tio estas kvazaŭ trovi pinglojn en maro! Por solvi tiun problemon, unue necesas fari eksperimentojn. Sed sur kies korpo? Sur tiu de pacientoj aŭ sur mia propra korpo? Tio certe estos suferiga. Tiam mi ekpensis pri kamarado Bethune, kiu, estante mem tre malforta, tamen persistis pri transfuzo de sia sango al ĉinaj kamaradoj. Se fremdulo povis tiel agi, ĉu mi hodiaŭ eĉ ne povas elteni tiun suferon? Plie, sen aŭd- kaj parol-kapablo, la surdmutuloj ne povos diri, ĉu la pinglo ĝuste trafas la punkton aŭ ne, kaj kian senton ili havas; eksperimentante sur mia propra korpo, mi povos plene sperti la senton estigitan de la akupunkturo. Estas pli grave ke la persona spertado de la sufero suferata de pacientoj povos eksciti mian klasan amon al ili. Mi do decidis fari eksperimentadon sur miaj propraj oreloj. Kiam kamaradoj pikis al mi sur orelan kartilagon per pinglo, mi sentis fortan doloron, la tuta kapo kvazaŭ estus bakita en fajro, kaj la tuta korpo ŝvitis senĉese. Domaĝe, en malĝusta loko; do oni enpikis refoje, sed denove maltrafe; ankaŭ je la tria fojo la provo ne sukcesis. Ni devis ĉesi, ĉar mi jam ne povis plu elteni la doloron. En la dua kaj tria tagoj ni kune faris aliajn sep eksperimentojn, sed neniu el ili sukcesis. Miaj kamaradoj admonis min, dirante: “Vi estas nun malsaneta, lasu la eksperimenton! Ne seriozigu per tio vian malsanon!” En miaj oreloj eksonis la instruo de Prezidanto Maŭ: “**Miloj post miloj da martiroj antaŭ ni heroe oferis sian vivon por la interesoj de la popolo. Ni alte tenu ilian standardon kaj marŝu antaŭen laŭ la vojo surver-**


ŝita per ilia sango!” La instruo de Prezidanto Maŭ kaj la heroaj figuroj de martiroj instigis min, tiel ke mi en la malfacila tempo vidis atingojn kaj lumon kaj levis mian kuraĝon por firme persisti ĝis la fino.

Post pli ol 30 pliaj eksperimentoj la venko finfine alvenis. Kiam la pinglo eniĝis en la lasta fojo, mi ekhavis acidan, paraliziĝan kaj ŝvelpreman senton. Mi tiel ĝojis ke mi forgesis ĉiujn suferojn. Mi finfine trovis la pozicion de la punkto kun grandeco de pinglokapo. Akirinte tiun sperton, mi daŭrigis la eksperimentojn elekte pri la aliaj dekoj da punktoj kaj trovis iliajn poziciojn ne precize notitajn en la libroj pri akupunkturo kaj kaŭterizo.

Trovinte la poziciojn de la punktoj mi kuraĝe komencis laŭplane akupunkturan kuracadon. Iu 15-jara denaska mutulo nomata Giang Baŭĉuan, kiu antaŭe ne povis aŭdi eĉ tondron, akiris aŭdkapablon post kvarfoja akupunkturo. Kiam mi ŝovis mian brakhorloĝon apud lian orelon, kun ĝojbrila vizaĝo li faris geston al mi, ke li jam la unuan fojon aŭdas sonon. Tio plifirmigis mian fidon por kuraci surdmutulojn. Post pli ol 30-foja akupunkturo lia aŭdkapablo fariĝis fundamente normala, sed li ankoraŭ ne povis paroli. Kie estas la ŝlosila punkto por kuraci mutulon? El iu akupunktura kaj kaŭteriza libro mi legis ke ĝi troviĝas sur la nuko kaj nomiĝas *jamen* (muta pordo). La libro plie diras ke ĝi estas “danĝera” punkto, la maksimuma profundeco por enigo de pinglo limiĝas je 3-5 dekonoj de colo. Plia profundigo mutigos sanulon aŭ eĉ kaŭzos morton.

Por trovi efikan metodon por kuraci mutulon, necesas scii, kia profundeco de enigo de la pinglo en la punkton *jamen* plej efikas. Por sondi la “danĝeran” punkton deklaritan de la medicino jam centojn da jaroj kaj plej frue forigi la suferojn de klasaj gefratoj, mi decidis fari eksperimenton sur mia propra korpo. Se mi mortos pro la eksperimento, mi almenaŭ trovos por mi indan lokon por morto. Pro la interesoj de la popolo, Huang Giguang, Dong Cunĵuj, Vang Gie kaj aliaj kamaradoj, “klare konsciante ke en la montoj estas tigroj, iras tamen renkonte al ili”. Por sekurigi junajn revoluciajn batalantojn, kamarado Caj Jonghiang ne timis danĝeron kaj oferis sian vivon por la revolucia afero. La instruo de Prezidanto Maŭ kaj la figuroj de la herooj donis al mi senfinan forton. Do rigardante la portreton de nia

Disvolvante la revolucian spiriton sin apogi sur la propraj fortoj, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Ŝanhaja Fabriko de Precizaj Ilmaŝinoj trarompis la malhelpadon kaj obstrukcadon de burĝaraj reaciaj teknikaj "aŭtoritatoj" kaj mem projektis kaj fabrikis altprecizan ilmaŝinon sub la kunlaborado de frataj unuoj. La nova preciza ekipaĵo por produkto de aparatoj atingis la progresintan nivelon de la mondo kaj havas sian propran ĉinan stilon.



Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Dua Ŝpin-tekstila Fabriko de Ŝanhajo mem projektis kaj fabrikis ŝpinmaŝinon de modelo A 512 kun monda progresinta nivelo kaj ĉinaj propraj karakterizaĵoj. Tiu nova maŝino alte aŭtomatigita kaj facile manipulebla povas produkti rapide kaj bonkvalite. Jen laboristoj kontrolas ĝian funkciadon.



granda ĝvidanto Prezidanto Maŭ, tenante pinglon en unu mano kaj palpante la punkton *jamen* per la alia, mi komencis enigi la pinglon. En la komenco mi sentis iom doloron. Tio estas nenio. Ignorante ĝin, mi daŭre enpuŝis la pinglon. Kiam ĝi profundigis ĝis duona colo, mi ankoraŭ ne sentis ion eksterordinaran. Mi do kuraĝe kaj singarde plu enpuŝis ĝin ĝis 8, 10, 12, . . . 15 dekonoj de colo; tiam mi eksentis ŝvelpremon en la kapo kaj kapturiniĝon, mi aŭdis zumadon en la oreloj kaj paraliziĝis al mi la lango. Mi pensis, ke tiujn sentojn kaŭzas la ekscito de la piko, kvankam malagrablajn por sana homo, tamen, eble kun kuraca efiko por malsanulo. Por plene malkovri la sekreton, mi profundigis la pinglon ĝis 2 coloj. Tiam la kapturiniĝo kaj la doloro de la kapo pliiĝis, mi sentis, kvazaŭ io ŝtopus mian gorĝon, kaj mi sentis vomemon. Tiutempe lumis antaŭ mi kiel brila lampo la instruo de Prezidanto Maŭ "Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon". Mia cerbo tuj klariĝis, kaj ŝajne sonis al mi la krio de mutulo: "Vivu Prezidanto Maŭ!" Tio multe fortigis mian fidon por persiste teni la pinglon enigitan en tiu profundeco je unu minuto. Mi faris tiamaniere trifoje la eksperimenton sur mia propra kapo.

Kamaradoj de nia sanitara grupo ĉiuj volas ke mi eksperimentu sur iliaj korpoj. Mi faris po unu pikon al du kamaradoj. Post kiam el la 5 sinsekvaj ekperimentoj mi certigis pri la sendanĝereco de la akupunkturo, mi komencis apliki tiun terapion al la 24-jara pacientino Hiong Ĝongjing. Post kelkaj akupunkturoj ŝia aŭdkapablo rapide altiĝis kun evidenta efiko kaj ŝi povis balbuti iujn sonojn.

Al Giang Baŭĉuan mi faris pli ol 60 akupunkturojn. Kaj post periodo de ekzercado de elparolo, iutage tiu denaska surdmuta junulo rigardis portreton de Prezidanto Maŭ, starigis sian dikfingron, kaj elkriis pli malpli kontinue la ore brilajn vortojn "Vivu Prezidanto Maŭ!" Tion li ripetis plurajn fojojn. Tiutempe mi saltis de ĝojo. Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Dank' al via instruo, miljara "fera arbo"*** povas flori, kaj denaska mutulo povas paroli. De nun mi studos por ĉiam viajn verkojn, klopodos remuldi mian mondkoncepton kaj laboros kiel bona kuracisto de la popolo, inda al la nomo.

***Popola nomo por cikaso (cycas revoluta), kiu malofte floras.

Revolucia Pioniro

— pri la maljuna malriĉkampano Jan Hieĉong



Antaŭ pli ol 40 jaroj nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam montris kun emfazo: “En la kamparo, la malriĉkampanoj estas la ĉefa forto, kiu ĉiam penege kaj energie batalas”, “Ilia ĝenerala revolucia direkto estas ĉiam korekta”, ili estas “revoluciaj pioniroj”. Jan Hieĉong, maljuna malriĉkampano de Tangĝaj-brigado, Hiaŭsong-komunumo, Lankaŭ-gubernio, Henan-provinco, ja estas unu el miloj kaj dekmiloj da “revoluciaj pioniroj” en nia kamparo.

— La Red.

De 20 jaroj, strikte sekvante la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, Jan Hieĉong plene ludis la rolon de revolucia pioniro en la granda batalo por konstrui novan socialisman kamparon. En la agrara reformo, li kuraĝe elpaŝis kaj aktive gvidis, kiel grupestro de la Kampana Asocio, malriĉkampanojn kaj malsuperajn mezkampanojn batali kontraŭ bienuloj kaj dividi iliajn agrojn, plene faligante la miljaran feŭdan sistemon. En la agrikultura kooperigado li iris antaŭ aliaj, laboris kiel estro de interhelpa grupo kaj neflekseble sekvis la socialisman vojon sub la direktado de

Prezidanto Maŭ kune kun aliaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. En la senprecedenca proletara kultura revolucio, li brave batalis en la plej antaŭa fronto klasbatala, kaj en la sentima revolucia spirito **“al miltranĉa mortpuno spiti kaj tiri imperiestron de sur ĉevalo tute ne heziti”**, gvidis kaj unuigis la vastajn amasojn de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj por plenforte ribeli kontraŭ la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj firme defendi la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ.

“LA OKULOJ DE KAMPARANOJ TUTE NE ERARAS”

En 1966, la ŝtormo de la granda proletara kultura revolucio tre rapide envolvis Lankaŭ. En paniko la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la antaŭa gubernia komitato de la Partio haste subinstigis feĉon de la socio kaj trompis parton de la amaso, por deturni la celon kaj direkti la lancpinton de batalo kontraŭ la revolucia gvidanta kadro Ĝang Kinli, vicsekretario de la gubernia komitato de la Partio, batalamiko de Giaŭ Julu, kiu estas bona lernanto de Prezidanto Maŭ. (Pri la revoluciaj heroaĵoj de kamarado Giaŭ Julu oni legu la artikolon “Modelo por Guberniaj Partisekretarioj”, publikigita en nia gazeto, n-ro 4, 1966.)

Ĝuste en tiu tempo, kamarado Jan Hieĉong lernis en la gubernia urbo. Tion rimarkinte, li tuj rememoris la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Pri ĉiu ajn afero komunistoj devas demandi: kial.”** Li pensis ree kaj ree: Kamarado Ĝang Kinli aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj firme iras la socialisman vojon. Sekvante la piedsignojn de k-do Giaŭ Julu, li vizitas nur malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn, manĝas nur ĉe ili, kaj laboras nur por ili. Li estas bona kadro persistanta ĉe la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Kial iuj atakas lin kiel “politikan poŝteliston”? Dum li pensis pri tio, la instruo de Prezidanto Maŭ sonis ĉe liaj oreloj: **“Post kiam la malamikoj kun armiloj estos ekstermitaj, restos ankoraŭ malamikoj sen armiloj, ili nepre faros vivmortan lukton kontraŭ ni.”** Ehe, certe klasaj malamikoj intrigas en tio!

“La okuloj de kamparanoj tute ne eraras. Kiu estas malbona, kiu ne malbona, . . . kamparanoj klare vidas.” Travidinte la intrigon de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la gubernia komitato de la Partio, Jan Hieĉong tuj komprenis, ke tio estas akra luktado inter klasoj kaj grava ŝtata afero, kiun li devas nepre zorgi kaj ne lasi la potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon apliki diktaturon super la proletaro! Li decidis tuj reveni al sia komunumo por mobilizi la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn ribeli kontraŭ enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon.

Reveninte al sia vilaĝo, li tuj okazigis kunvenon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la brigado, en kiu li entuziasme propa-

gandis la grandan signifon de la proletara kultura revolucio iniciatita kaj gvidata persone de Prezidanto Maŭ kaj profunde malkaŝis la malican intrigon de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la gubernio. Rapide ekagis kaj sinorganizis la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Tangĝaj-brigado por sinĵeti en la batalon por defendi la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ sub la konduko de Jan Hieĉong. Ankaŭ malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de aliaj komunumoj organiziĝis sen antaŭa interkonsento kaj tiel formiĝis granda kamparana revolucia ribela armeo sub la “Komandejo de Lankaŭ-aj Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj por Defendi Giaŭ Julu kaj Ribeli”. Jan estis elektita kiel ĝia vicestro. Unuiĝinte kun aliaj revoluciaj amasaj organizoj, ili komencis vivmortan batalon kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon.

**“KIU REVOLUCIAS, NE TIMAS MORTON;
KIU TIMAS MORTON, NE REVOLUCIAS”**

La firma starpunkto kun klara amo kaj malamo kaj la nevenkebla batalspirito de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Lankaŭ tre teruris la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la gubernio. Ili kolektiĝis en malluma angulo por ellabori novan kontraŭrevolucian taktikon kaj decidis diserigi la revolucian vicaron per “sukertegitaj obusoj”. Antaŭ ĉio ili volis korupti la maljunan malriĉkamparanon Jan Hieĉong.

Tiel, iu konfidato de enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon vizitis iutage Jan. Li elpoŝigis 15 juanojn kaj diris: “Maljuna Jan, prefere reiru hejmen! Kion vi scias ja pri revolucio?” Jan Hieĉong larĝe rondigis siajn okulojn, forpuŝis lin kaj rigore riproĉis: “For! Subaĉeti min per mono? Eĉ per vagonaro vi alportus ĝin, mi ne ĵetos al ĝi rigardeton! En miaj okuloj estas nur la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ!” La sonoraj vortoj de Jan manifestis la senliman fidelecon de miloj kaj dekmiloj da malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj al Prezidanto Maŭ kaj ilian senliman malamon al ĉiuj klasaj malamikoj.

La sukertegita obuso de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon fiaskis antaŭ la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj la potenco partia, administra, financa



Jan Hiečong

kaj kultura uzurpita de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon estis rekaptita de la proletara revoluciularo de Lankaŭ. Sed la plenumo da enpartiaj potenctenantoj nekuraceblaj irantaj la kapitalisman vojon komplotis kun plenumo da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la subprovinca kaj provinca komitatoj de la Partio, levis kontraŭfluron de kontraŭrevolucia restaŭro kaj kontraŭleĝe malliberigis Jan.

“Ĉiuj reakciuloj estas papertigroj.” Jan Hiečong tute ne prenis la persekuton fare de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en siajn okulojn. Kun la decido vivi por kaj morti por la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, li obstine batalis kontraŭ la burĝara reakcia linio.

Konfidatoj de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon arogante demandis lin: “Kial vi voluntas esti ‘rojalisto’, kiu defendas la po-

tentenantojn?” Jan donis decideman respondon: “Mi defendas Prezidanton Maŭ kaj lian proletaran revolucion linion; mi defendas la socialisman ŝtaton! Mi estis tia antaŭe, kaj mi ankoraŭ estos tia poste; mi estos tia ĝis la fino kaj dum la tuta vivo!”

Nenion atinginte post longa pridemando, la pridemandintoj povis nur foriri malbonhumore kaj sensukcese.

Antaŭ la klasaj malamikoj Jan Hiečong firme montris: “Kiu revolucias, ne timas morton; kiu timas morton, ne revolucias. La kapo povas esti dehakita, la sango povas esti verŝita, sed la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ ne povas esti forlasita!” Li malsukcesigis sinsekve la intrigojn de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon per la spirito de “malmola osto” de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.

Vidante, ke la "detrua influo" de Jan Hieĉong estas tre granda, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon provis uzi molan rimedon por logi lin al "kapitulaco". Ili ŝajnis sin tre zorgemaj al Jan kaj sendis al li litkovraĵon pere de sia konfidato, kiu diris: "Vi ja estas maljuna, do ricevu litkovraĵon. Ve, ...aĝo maljuna ne estas oportuna, kaj ĝi konfuzas vian kapon..." Jan Hieĉong tuj interrompis lin: "La penso de Maŭ Zedong estas la ruĝa suno, kiu lumigas mian koron. Nur vi mem konfuziĝas nesekvante Prezidanton Maŭ!" La sendito ankoraŭ esperis persvadi lin kaj diris: "Ĉar vi estas reprezentanto de la Asocio de Malriĉkamaranoj kaj Malsuperaj Mezkamaranoj, oni estos indulgema al vi. Nur skribu memkritikon kaj konfesu la kulpon, oni jam liberigos vin." Jan decideme respondis: "Mi en nenio kulpas, defendante la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ!" Trovante ke ne efikas la mola rimedo, la konfidato de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon subite ŝanĝis sian mienon kaj ekminacis lin: "Jan Hieĉong! Kion vi preferas, morton aŭ vivon?" Jan ridis malestime kaj diris sentime: "Mi staros ĉiam ankoraŭ sur la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj neniam ŝanĝos mian koron dum la tuta vivo, eĉ se vi metos sabron sur mian nukon!"

La potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon jam aplikis ĉiujn metodojn molajn kaj malmolajn, tamen ili atingis nenion kaj povis nur resendi lin al la komunumo por ke li faru "introspekton".

"FIDELECO AL PREZIDANTO MAŬ NENIAM ŜANĜIGOS"

Reveninte al la vilaĝo, Jan uzis la tempon de "introspekto" por rakonti al malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, kiel li estis persekutata de la burĝara reakcia linio, kaj por akuzi kaj malkaŝi la enpartiajn potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon. En iu kunveno, li diris al siaj klasaj fratoj: "En la malnova socio, pro malsata jaro, tri generacioj de mia familio fuĝis kaj almozpetis, kaj sin dungigis ĉe bienuloj, kvin el miaj familianoj mortis de suferoj. Estas Prezidanto Maŭ kiu gvidis nin revolucii kaj starigi la socialisman ŝtaton. Sed la ĉina Ĥruŝĉov intencas retroirigi nin malriĉkamaranojn kaj malsuperajn mezkamaranojn por ke ni refoje suferu la malnovan mizeron; tion ni neniam konsentos ĝis morto!" Tiam Jan Hieĉong ekkantis laŭte *Ruĝas la Oriento*,

kaj kunkantis tuj la ĉeestantaj malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj.

Jan Hieĉong energie batalis por la revolucio ĝis sinforĝeso. Li ofte diris: "Mi luktas ne por mi mem, por ke mi sola manĝu kaj trinku pli bone kaj havu pli bonan vivon, sed por ke nia lando neniam ŝanĝu sian koloron kaj liberiĝu ĉiuj subpremataj popoloj de la mondo." Li tenas la patrimon en la koro kaj etendas sian rigardon al la tuta mondo, prenante la liberigan aferon de la tuta homaro kiel sian karieron dum la tuta vivo. Printempe, 1965, Jan Hieĉong iris al Ĝengĝou por partopreni kongreson de reprezentantoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, dum kiu li vizitis la "Ekspozicion pri Agresaj Krimoj de Usonaj Imperiistoj en Vjetnamio". Li larmis dolore antaŭ la fotoj, en kiuj usonaj imperiistoj masakras sudvjetnamajn klasajn fratojn. Hejmen reveninte, li okazigis familian kunsidon kaj faris decidon, ke ĉiu el la familio ŝparu ĉiutage du uncojn da greno por subteni Vjetnamion. De tiam ili manĝis pli multe sorgon kaj malpli multe tritikon kaj tiamaniere ŝparis sume pli ol cent kilogramojn da tritiko dum la periodo de aŭtuna rikolto, por sendi al Vjetnamio en oportuna tempo.

Li kutime tre zorgas ankaŭ siajn klasajn fratojn en proksimo. En pluvaj tagoj, kiam akvoportado estas malfacila por familioj de PLA-anoj aŭ garantiataj familioj*, en kiuj mankas laborforto, li tion faras por ili. Li ankaŭ monhelpas malriĉkamaranojn kaj malsuperajn mezkamaranojn kies vivo estas malfacila, mem vivante tre ŝpareme. Pro tio la amasoj nomas lin intimo de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj kaj bona kamarado simila al Giaŭ Julu.

Jan Hieĉong nun estas reprezentanto de la Asocio de Malriĉkamaranoj kaj Malsuperaj Mezkamaranoj de Henan-provinco, membro de la Lankaŭ-a Revolucia Komitato, respondeculo de la gvida grupo de Tangĝaj-brigado. La vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj intime nomas lin "nia reprezentanto Jan".

* *En la kamparo de Ĉinio, la popola komunumo garantias la provizadon kaj prizorgon de vestoj, nutraĵo, loĝejo, malsano kaj entombigo al gevidvoj, georfoj kaj senidaj soluloj, kiuj ne havas laborforton. La familio de tiaj personoj garantiata je la nomitaj kvin flankoj estas nomata garantiata familio.*

Sekvi Prezidanton Maŭ

Signifas Venkon

MI naskiĝis en la familio de malriĉkamarano, kiu estis jardungito de bienuloj same kiel siaj prauloj de multaj generacioj. Kiam mi estis sepjara, mi jam komencis labori kun mia patro. Mi fariĝis jardungiteto ĉe bienulo en mia dektria jaro. Mi plenumis la laboron de bovo kaj ĉevalo, kaj prenis la manĝaĵon de porko kaj hundo. Mi estis plene ekspluatata kaj subpremata de la bienulo, kaj baraktis sur la linio de morto. En 1949, kvazaŭ printempa tondro la venko de la Liberiga Milito dispelis la nigrajn nubojn sur la ĉielo. Nia savanto Prezidanto Maŭ eltiris nin suferantojn el la abismo de amaro. Sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong, mi jardungito fariĝis membro de la Komunista Partio kaj revolucia kadro. Mi iris el tuta koro laŭ la vojo montrita de mia amata Prezidanto Maŭ. Kion Prezidanto Maŭ instrukiis, mi tuj plenumis. Kune kun la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, mi batalis kontraŭ la bienuloj, dividis ilian teron, fondis interhelpajn grupojn, kooperativojn, kaj fine popolajn komunumojn. Senĉese altiĝis mia politika konscio. Kaj mi estis elektita kiel tutlanda labormodelo kaj popola reprezentanto de la lando; multfoje mi vidis la grandan instruanton Prezidanto Maŭ kaj eĉ manpremis kun li. Ĉion ĉi tion mi eĉ neniam songis. Tial, kiam mi aŭdas la kanton "La tero kaj ĉiel' ne tiom grandas, kiom la favoro de l' Partio, la patro kaj patrin' ne estas tiom karaj, kiom Prezidanto Maŭ", mi ĉiam estas emociata kaj foje-refoje krias en mi: "Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu longe Prezidanto Maŭ!"

*La ĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de Huangtugang-komunumo, Fengtaj-distrikto, Pekino.

La vojo kondukanta de la interhelpa grupo kaj kooperativo ĝis la popola komunumo ja ne estis glata. La faligitaj bienuloj kaj tiuj, kiuj malamas la socialisman socion, ĉiutempe volas restarigi sian perditan "paradizon". Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris al ni: "**La kooperiga movado de agrikulturo ja dekomence estas serioza batalo ideologia kaj politika.**" Kaj la batalo estis longdaŭra, zigzaga kaj iam eĉ tre akra.

En la printempo de 1950, kiam ĵus finiĝis la agrara reformo, mi organizis la unuan portempan interhelpan grupon kune kun du familioj de malriĉaj kamaranoj laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ "**organizigu**" por iri la vojon de kolektivismo. En 1951, ni fondis la unuan konstantan interhelpan grupon. En la printempo de 1952, sur la bazo de tiu ĉi konstanta interhelpa grupo, transsaltante la etapon de unuagrada kooperativo, ni rekte organizis la unuan altgradan agrikulturan produktan kooperativon. Kiam ni kun ĝojego informis tion al la malnova partia komitato de Pekino, pensante ke ni ricevos de ĝi subtenon kaj helpon, ĝi verŝis sur nin, male, malvarman akvon, dirante: "Ne starigu kooperativon! Tio ne konformas al la leĝo de disvolviĝo de socialismo; la kamaranoj ja ankoraŭ ne havas tiel altan konscion." Plurfoje ni petis ĝian sankcion, sed ĝi ne konsentis. Tiel, ni tre indigniĝis kaj decidis tute ignori ĝin kaj memstare iri nian vojon. Ni firme kredis pri la larĝa vojo "**organizigu**", montrita de Prezidanto Maŭ. Ni malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj iros definitive la vojon, montritan de Prezidanto Maŭ!

Kiam fondiĝis nia kooperativo, tuj elmontriĝis ĝia supereco. Tiam nia kooperativo havis 107 muojn da tero. La totala produktkvanto pliiĝis je 45% kompare kun tiu en la periodo de interhelpa grupo. Samtempe, ni kreis la rekordon de alta produkto de brasiko kaj terpomo inter la antaŭurboj de Pekino.

En 1955, Prezidanto Maŭ faris la faman raporton *Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo* kaj poste skribis antaŭparolon kaj notojn al la libro *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kamparo*. Tiuj instrukcioj de Prezidanto Maŭ plie lumigis al ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj la direkton de antaŭenirado. Ĝuste en tiu tempo, nia amata Prezidanto Maŭ persone konfirmis la sperton de rekta transiro de interhelpa grupo al altgrada kooperativo farita de Bajpenjaŭ (unu el la brigadoj de nia komunumo en la nuna tempo) per noto: **“Tiuj estas du kooperativoj formitaj el interhelpaj grupoj, kiuj rekte eniris la formon de altgrada kooperativo, sen trapaso de la formo de unuagrada kooperativo. Oni povas tiel fari en la lokoj, kie troviĝas konformaj kondiĉoj. La kazo de Bajpenjaŭ estas ĝojiga. Iuj el ĝiaj spertoj estas utiligeblaj ankaŭ por unuagradaj kooperativoj.”** La noto de Prezidanto Maŭ varmigis mian koron. Tio estis la plej granda subteno kaj kuraĝigo de la granda instruanto Prezidanto Maŭ por ni kaj peza bato por la kontraŭrevolucia, reviziisma kliko de la malnova partia komitato de Pekino.

Post la fondiĝo de la altgrada kooperativo, kun senkompara entuziasmo, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj unuanime volis plisolidigi kaj plipotencigi la kolektivajn ekonomion.

Tamen, la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Pekino timis kaj malamis la altan fervoron de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por iri la socialisman vojon. Tial, ili levis la diablan venton de kalumnio, ke “kooperativo ne havas superecon”, kaj bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, dekstruloj kaj malbonaj elementoj ekaktivis kaj kriaĉis, ke “la kooperativo estas tro frue fondita”, kaj ke “la rilato inter la laboristoj kaj kamparanoj estas detruita”, por malkaŝe ataki la kooperativon. En tiu tempo, tiu diabla vento konformis al la bezonoj de la kapitalisma forto en la kamparo, kaj kuraĝigis la spontanegan kapitalisman tendencon de bonhavaj kamparanoj. Kaj tuj aperis kriaĉoj pri “eksiĝo el la kooperativo kun retiro de ĉevalo”. En la antaŭvespero de la Printempa Festo, iu bonhava kamparano ŝtele fortiris hejmen siajn mulon

kaj ĉaron, kiujn li transdonis antaŭe al la kooperativo kiel investon. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj absolute ne konsentis al tio kaj reprenis liajn ĉaron kaj mulon. Ili diris: Ĉio jam investita al la kooperativo estas posedaĵo de la kolektivo. Neniu rajtas ĝin tuŝi. Tiel, post sinsekvaj akraj bataloj, la okuloj de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj fariĝis pli klaraj, ilia socialisma konscio estis multe altigita, kaj la kolektiva ekonomio fariĝis pli firma kaj pli potenca.

En 1958, sub la brilo de la ĝenerala linio de la Partio por socialisma konstruado ellaborita persone de Prezidanto Maŭ, aperis en nia nacia ekonomio nova situacio de antaŭensaltego. Kaj en la kamparo amase fondiĝis popolaj komunumoj en tute nova formo de socia organizo.

Kiom belega kaj neforgesebla ja estis la jaro 1958! Je la 13-a de aŭgusto de tiu jaro, nia estimata kaj amata instruanto Prezidanto Maŭ inspektis la kooperativojn en la regiono de Fengtaj. Tiu dato ja estis tago festa, glora kaj ĉiam neforgesebla por ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ĝuste post lia inspekto, je la 28-a de aŭgusto, glore naskiĝis nia Huangtugang-a Popola Komunumo! Por celebri ĝian naskiĝon ni okazigis kunvenon dekmilpersonan. Ni unuvoĉe hurais: Bona estas la popola komunumo! Bona ja estas la popola komunumo!

La popolkomunumigo ebligis al la agrikultura kolektivigo antaŭensalti al nova stadio. Estis videble ke baldaŭ pereos la kapitalismaj fortoj en la kamparo! Tamen, la klasaj malamikoj tute ne voluntas akcepti sian malvenkon. Kiam nia ekonomio trafis portempajn malfacilojn, ili pensis, ke venas jam la tempo por “renversi la mondon”. Tial la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Pekino denove elsaltis por furioze ataki la popolan komunumon, absurde dirante, ke “la kamparanoj ricevis nenion bonan de la kolektiva ekonomio dum la lastaj jaroj” ktp. Sub ilia agitado, en la kamparo ekblovis la nigra vento de “tri pliigoj kaj unu fikso”** kaj “kvar liberoj”**. Konforme al intenco de sia nigra mastro, la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en nia komunumo disvolvis kaj plibeligis la “tri pliigojn kaj unu fikson” kaj “kvar liberojn”. Tamen, tute egale, kian belan etiketon ili donis al siaj nigraj varoj, ili ne povis kaŝi la kriman esencon de sia ago distrumpeti individuan mastrumadon en agrikulturo, lasi kapitalismon libere inundi en la kamparo kaj detruigi la kolektivajn ekonomion.



Kamarado Jin Vejĉen (la 4-a de dekstre) studas kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la komunumo.

Ili taskis al siaj fidelaj sekvantoj fari “eksperimentadon” kaj krei “sperton”.

En 1962, la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en nia komunumo praktikis speciale en iu brigado ilian nigran varon. Tio kaŭzis haŭson en produktado kaj malunuiĝon inter la komunumanoj. Poste, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj travidis ilian intrigon celantan detrui la kolektivajn ekonomion kaj unuanime ĝin repuŝis.

Vidante, ke ili ne povas per tio trompi nin malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn, la kontraŭrevolucia, reviziisma kliko de la malnova partia komitato de Pekino estrata de

***Vidu “Enciklopedieton” en EPC n-ro 2, 1968, P.71.*

Peng Ĝen tuj antaŭenpuŝis la reviziisman “materian stimulon”. Ili promesis “premio” la komunumanojn kulturantajn legomojn per greno, sed ili samtempe minacis ke, se la produktkvanto de legomoj ne atingos la fiksitan normon, la koncerna legom-areo estos ŝanĝita en grenareon kaj la kulturantoj ne plu “ĝuos” la privilegiojn de legom-areo. Jen “premio” kaj “ĝuo”. Tio estis nur granda insulto al ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Estas natura devo de ni kulturantoj de legom-areo provizi niajn laboristajn fratojn kaj la revolucian popolon en la urbo per legomoj. Ni kulturamas legomojn por la revolucio, ĉia ajn “premio” aŭ “ĝuo” ne povas sanĉeli nian senliman fidelecon al Prezidanto Maŭ kaj nian firman volon iri la socialisman vojon.

Ili komplotis inter si, ŝirmis fiulojn kaj faris multajn krimojn. Sed nigraj nuboj ne povas ĉiam vuali la sunon! En 1966 la revolucia linio de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ refoje akiris grandan venkon en Huangtugang. Ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj sukcesis eltreni sub la sunlumon la demonojn kaj diablojn protektitajn de la kontraŭrevolucia reviziisma kliko de la malnova partia komitato de Pekino! Tio donis pezan baton al la plenmano da klasaj malamikoj kaj iliaj ĉefaj subtenantoj — la ĉina Ĥruŝĉov kaj la kontraŭrevolucia reviziisma kliko de la malnova partia komitato de Pekino!

La granda proletara kultura revolucio iniciata kaj gvidata persone de Prezidanto Maŭ ĝisfunde verdiktis mortpunon al la kontraŭrevolucia, reviziisma kliko de la malnova partia komitato

ZANHIN:

Post Ŝanĝiĝo de la Pozicio

NUTRATE de la sune brila penso de Maŭ Zedong kaj hardite en la ardaĵ flamoj de la granda proletara kultura revolucio, la juna ŝarĝisto Liang Fej, kiu devenis de dokista familio, estis elektita de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj kiel vicĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de la Ŝanhaj-havena Administracio.

Ŝanĝiĝis la pozicio de kamarado Liang Fej, novaj provoj lin atendis, la revoluciaj klasfratoj lin atente rigardis kun zorgemo, kaj ankaŭ li mem ĉiam sin gardis kontraŭ korodado de la burĝara penso.

Post fondiĝo de la revolucia komitato de la havena administracio, svarmis ĉe ĝi diversaj laboroj kaj ĉiutage sennombrajn aferojn li devis trakti kaj aranĝi. Ĉu aŭskultadi raportojn kaj disdoni

de Pekino kaj la ĉina Ĥruŝĉov. La vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, centmiliono popolo kaj armeo ĝojegis pri tio. En tiuj tagoj, mi eĉ ne povis endormiĝi dum pluraj noktoj pro ĝojekscitiĝo, kaj mia koro similis al bolanta kaldrono. Kiom multe mi pensis, mi pensis kaj pensis... Kaj kiom multe da vortoj ni volis diri al Prezidanto Maŭ. Ne sufiĉas nia vortaro por priskribi la grandajn meritojn, kontribuojn kaj bonfarojn de nia amata Prezidanto Maŭ!

Kiam renkonte al la plenaryksa venko de la granda proletara kultura revolucio, la kelkcentmiliono revolucia popolo de nia lando varme celebras la 10-an datrevenon de popolkomunismo, mia ardanta koro neniel povas kvietiĝi. Rememorante la trairitan vojon ni povas esprimi ĝin per unu frazo: Sekvi Prezidanton Maŭ signifas venkon!

ordonojn sidante en la oficejo, aŭ enprofundiĝi kaj enradikiĝi en la amasojn? El la leciono de la erarintaj kadroj, li profunde konsciis, ke oni neniam devas forgesi la instruon de Prezidanto Maŭ “**neniam disiĝi de la amasoj**”, kaj li firmdecide iris el sia oficejo, profundiĝis en la grupojn kaj grupetojn de laboristoj, rekte transdiris la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ al la laboristoj kaj kadroj kaj faris kun ili aranĝojn pri novaj laboroj, aŭskultis opiniojn de la amasoj kaj ĉiam batalis kune kun ili.

En novembro de la pasinta jaro, Liang Fej kaj iu alia kamarado veturis al Pekino por raporti laboron. Antaŭ ilia ekiro, iu revolucia gvidanta kadro diris al li kun sincera zorgemo: “Pekino estas loko, kie loĝas Prezidanto Maŭ, nepre ellernu tion tie bone utiligante tempon, kaj reportu al ni

la bonajn spertojn, sed nefaru vizitojn diversloke, nek diru jes aŭ ne pri tiaj aferoj”. Nelonge post alveno al Pekino, Liang Fej kaj lia kunulo ricevis invitilon de la Kongreso de Laboristaj Reprezentantoj de la ĉefurbo. Oni petis, ke li ĉeestu ĝian mitingon de centmil ĉeestantoj kaj faru paroladon en ĝi. Tiam Liang Fej pensis: “Ŝanhajo estas la naskiĝloko de la Januara Revolucio, kaj krome ankaŭ nia haveno iom famiĝis. Eble la mitingon ĉeestos gvidantoj el la Centra Komitato de la Partio!” Sed kiam li ekmemoris la vortojn, ke “Pekino estas loko, kie loĝas Prezidanto Maŭ”, li tuj konsciis, ke lia deziro estas esence manifestiĝo de individuisma sentimento! Do li diris al kuniranta kamarado: “Ankoraŭ estas multaj mankoj en nia laboro, kaj ni ne povas akcepti tian honoron.” Poste, li speciale iris lerni la sperton de la Kongreso de Laboristaj Reprezentantoj de la ĉefurbo kun sincera volo lerni de la laboristaro de Pekino.

Foje, oni faris provan projekcion de la specimeno de la dokumenta filmo *Ĉe la Ŝanhaja Haveno Brilas la Penso de Maŭ Zedong*, filmitan de la ŝanhaja filmfarejo Ruĝas la Oriento. Liang Fej kaj kelkaj aliaj kamaradoj de la revolucia komitato de la havena administracio veturis en aŭtomobilo al la filmfarejo por rigardi la filmon. Kiam ili venis al ĝia pordego, li renkontis junan ruĝan gvardianon, kiu iam batalis kun li ŝultron ĉe ŝultro ĉe la haveno. Montrante la aŭtomobilon, la ruĝa gvardiano diris ŝerce: “Zorgu vin, Liang Fej, de reviziistiĝo!” Tion aŭdinte, Liang Fej opiniis, ke tio ne estas ŝerco, sed alarmo donita de la batalkamarado. Li pensis en si: Mi nepre ne devas pravigi min per la kialoj de malproksimeco kaj plenumo de ofico. Jam estis profunda nokto, kiam li hejmen

revenis post rigardo de la filmo. Scenoj de la intensa kaj peniga batalo de la ŝtorma Januara Revolucio reaperis unu post alia en lia cerbo kaj ĉe liaj oreloj resonadis la “ŝerco” de la juna ruĝa gvardiano “Zorgu vin de reviziistiĝo!” Laŭkutime li malfermis la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj legis pensante ĉiun vorton: **“Eble troviĝas tiaj komunistoj, kiuj estas neniam konkeritaj de la malamikoj kun pafiloj kaj meritaj la titolon de heroo antaŭ tiuj malamikoj, sed ne povas rezisti kontraŭ la atako per sukertegitaj obusoj, kaj antaŭ tiuj ili estos venkitaj.”** Kaj Liang Fej ekhavis pliakran singardemon kontraŭ “sukertegitaj obusoj”.

La hejmo de Liang Fej situas en la laborista loĝkvartalo de Jangŝupu. Multmembra estas lia familio kaj ilia loĝejo estas relative malvasta. Iu diris al li: “Estas multaj neokupataj domoj aliloke, do transloĝiĝu jam!” Sed pri transloĝiĝo li eĉ neniam pensis, kaj kio okupis lian penson estis tio, ke sennombrajn sang-kaj larm-plenajn historiojn pri la dokistoj en la malnova socio lia patro rakontis al li ekde lia infanaĝo en la loĝata ĉambro. Ĉirkaŭe de tiu ĉambro nun loĝas dokistoj, kiuj bataladis kune kun li kaj tenadas sangokarne intiman rilaton de klasfratoj kun lia familio de pluraj generacioj. Tial, ĉiufoje kiam oni konsilis al li transloĝiĝi, li diris: “Preferinde estas loĝi ĉi tie, ĉar ne multe gravas la malvasteco de la ĉambro, sed se mi forlasus la laboristojn, mi sentus perdon de apogo, kvazaŭ fiŝo forlasinta akvon.”

Ja tia daŭriganto de la proletara revolucio, kiu strikte sekvadas Prezidanton Maŭ, enradikiĝis en la amasojn kaj tenadas la propran naturon de la laboristaro, estas kamarado Liang Fej.



Sinremuldi inter la Amasoj

DE kiam mi fariĝis kadro, mi ofte pensas: Mi estas filo de kamplaboristo, mi do ne devas forgesi la mizeron suferitan en la pasinteco, nek izoliĝi de la amasoj eĉ por momento, nek sinteni kiel grandsinjora moŝto, sed devas ĉiam labori kiel servanto de la popolo. En la komenco mi ne povis kutimiĝi al la maniero de iuj kadroj, kiuj tenas sin superule. Sed, kiam mi komencis labori en la gubernia institucio, kun la promocio de la ofico kaj plibonigo de la vivkondiĉoj mi malofte profundiĝis inter la amasojn kaj mia klasa amo al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj fariĝis ne tiel profunda kiel antaŭe. Antaŭ la granda proletara kultura revolucio, mi estis poste-nigita kiel sekretario de la partia komitato de Ŝanĉengzi-komunumo. Tiam mi estis iom elektema pri manĝaĵoj, vestoj kaj loĝejo, ĉar mi pensis en mi, ke sekretario devas havi la “manieron” de sekretario. Do ankaŭ la amasoj ekstraktis min alimaniere ol antaŭe. Foje, mi vizitis iun maljunan malriĉkamparanon. Kiam mi volis eksidi, la onklino rapide viŝis por mi la randon de la masonita lito. Dum manĝado, la onklo kaj onklino multe zorgis, ĉu mi ŝatas la manĝaĵon. Ili eĉ ne konsentis manĝi kune kun mi ĉe la sama tablo, kiel ajn mi tion petis de ili. Ĉe tio mi ekpensis, ke en la pasinteco, kiam mi batalis kontraŭ la bienuloj, organizis kooperativon, kaj laboris por la revolucio kune kun la fratoj-malriĉuloj, ni manĝis ĉe sama tablo, dormis sur sama lito, kamplaboris ŝultro ĉe ŝultro, kaj batalis manoj en manoj — la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj neniam traktis min kiel gaston. Sed nun la malriĉkamparanaj amasoj traktas min kun tia ceremonia maniero kaj rigardas min kiel “altrangan”. Ĉu ĉio ĉi tio ne montras,

ke mi ŝanĝiĝis? Ĉu tio ne estas severa kritiko al mi? Tio montras, ke mi ne estas plu ordinara popolano, sed ia “superulo” en la okuloj de la amasoj.

Post la komenciĝo de la granda proletara kultura revolucio, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj serioze kritikis miajn mankojn kaj erarojn. Iuj maljunaj malriĉkamparanoj diris al mi: “Vi estas filo de kamplaboristo kaj suferis amaron en la pasinteco. Vi fariĝis kadro, ĉar la Partio kaj la popolo fidis vin kaj deziris, ke vi bone tenu la potencon por la proletaro. Sed fariĝinte sekretario, vi eksentis, ke ni kamparanoj estas tro provincaj kaj vi ŝatas luksecon. Ĉu tio ne estas glitiĝo al la vojo de reviziismo!” Mi estis forte tuŝita en mia animo de tiuj zorgplenaj kritikoj de la amasoj, kaj pli profunde ekkomprenis, ke tio estas la divida linio inter la mondkonceptoj proletara kaj burĝara kaj grava distingilo inter la potenctenantoj proletaraj kaj burĝaraj, ĉu oni daŭre estas ordinaraj popolanoj kaj ordinaraj laborantoj, tutkore kaj tutanime servantaj al la popolo, aŭ izolas sin de la popolo kaj starigas sin super la aliaj kiel grandsinjoraj moŝtoj, post kiam oni fariĝis kadroj. Malgraŭ tio ke iu kadro devenas de laborula familio kaj venas el ordinara popolo, se li havas la penson, ke “la kadro ne povas esti simila al la ordinara popolano” kaj ne iras inter la amasojn por serioze remuldi sin, neeviteble li forgesos sian pasintecon, perdos sian originan koloron, degeneros, fariĝos grand-

*La ĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de Ŝanĉengzi-komunumo de Benhi-gubernio, Liaŭning-provinco.

sinjora moŝto rajdanta sur la kolo de la popolo, kaj, fine, falos en la marĉon de reviziismo.

Ekde tiam, sub la helpado de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kunportante miajn demandojn, mi aktive iris profunde inter la amasojn por serioze remuldi mian mondkoncepton kaj decideme fariĝi servanto de la popolo dum la tuta vivo. Foje, kunportante la ruĝan trezoran libreton de Prezidanto Maŭ, kaj kun litaĵo kaj produktaj instrumentoj sur la dorso, mi venis al la Gujziŝi-brigado, situanta en la plej malproksima angulo kaj havanta la plej malfacilajn kondiĉojn en la tuta komunumo. Mi speciale iris al la maljuna malriĉkamparano onklo Giaŭ Ming-liang por kune vivi, kune kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon, kune teni revolucion kaj stimuli produkton kun lia familio. En la komenco onklo Giaŭ diris, ke lia domo estas malpura, kaj konsilis min loĝi ĉe iu alia komunumano kun pli bonaj vivkondiĉoj. Mi do diris al la gemaljunuloj la instruon de Prezidanto Maŭ: "... la plej puraj ja estas la laboristoj kaj kamparanoj, ... ili estas pli puraj ol la burĝaj kaj etburĝaj intelektuloj, malgraŭ ke iliaj manoj estas nigraj kaj iliaj piedoj surhavas bovfekajon." Sam-

tempe, mi kritikis mem miajn estintajn erarajn pensojn kaj sincere petis ilian helpon. Tiel, ili rigardis min kiel sian samfamilianon. Post forĝado kaj remuldo dum certa tempdaŭro, mi ree sunbruniĝis, sur miaj manoj aperis dikaj kaloj, kaj mia korpo estis plena de polvo kaj koto. Sed pli grave estis, ke kreskis ĉe mi la sento de la proletaro. Mi pensis kaj faris tion, kion la amasoj volis en sia koro. Tiam, la amasoj diris, ke mi denove similas al la ordinara popolano, kaj oni intime nomis min "maljuna Haŭ" aŭ "Fenglin". Ili volonte eldiris antaŭ mi kion ili havis en sia koro kaj montris rekte al mi miajn manojn. Kiam fondiĝis la Revolucia Komitato de la komunumo, mi estis elektita kiel ĝia ĉefkomitatano.

En mia persona sperto mi profunde komprenis, ke la kadroj povas havi la senton de amasoj, fariĝi bonaj servantoj de la popolo, efektiviĝi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ, garantii sian ideologion libera de reviziismo, kaj ne perdi la regpotencon de la proletaro, por ke la koloro de la ŝtato sub la proletara diktaturo ne ŝanĝiĝu, nur kiam ili iras inter la amasojn por serioze remuldi sian mondkoncepton.

JU FENGJIN*:

La Amaso Estas

Vera Heroo

LABORANTE kune kun la reprezentantoj de revolucia amaso kiel membro de la gvidanta grupo de revolucia "triflanka kombiniĝo", mi venis al pli profunda kompreno pri la granda signifo de la instruo de la granda gvidanto Prezidanto

Maŭ, ke "en certa senco, la plej saĝa, plej talenta estas batalanto kiu plej ofte havas praktikan sperton".

Iutage, okazis ĉeso de elsendo de elektro tra la tuta fabriko pro difektiĝo de la ĉefa transformatoro de la elektrodistribua stacio kaŭze de per-

turbo en la cirkvito. Ni tuj kunvokis la produktajn respondeculojn kaj koncernajn teknikistojn por interkonsiliĝi. Ĉiuj opiniis, ke la difektita ĉefa transformatoro devas esti anstataŭigita. Sed por enporti la novan transformatoron, la orienta pordo estas tro malgranda, kaj enporti ĝin tra la okcidenta pordo faros la ĉeson de livero de elektro pli longdaŭra. Kiel agi finfine? Oni arde disputadis, sed ne povis trovi kontentigan solvon. Tiam malgranda Dong, reprezentanto de la revolucia amaso, diris: “Prezidanto Maŭ instruis al ni, ke la amaso estas vera heroo. Kion ni atingos, se ni nur disputas sidante en la oficejo? Laŭ mia opinio, ni devas iri al la loko por interkonsiliĝi kune kun la amaso, tiam ni certe trovos rimedon.” Tion dirante, li la unua eliris la oficejon, kaj ĉiuj lin sekvis. Veninte al la elektrodistribua stacio, ili interkonsiliĝis kune kun la laboristoj. Ĉiuj cerbumis kaj faris proponojn. Fine oni venis al la ideo malkonstrui parton de la malantaŭa muro proksima al la vojo por enporti la novan transformatoron kaj poste rekonstrui la muron. Rezulte oni uzis nur pli ol 7 horojn por rekomenci la produktadon de la tuta fabriko, anstataŭ 15 horoj laŭ la origina antaŭkalkulo.

Post tio, kun profunda impresio mi diris al malgranda Dong: “Vi ja estas sagaca; videble, oni ne povas elpensi tian metodon sidante en la oficejo.” “Tio ĉi ne estas demando de metodo, sed demando, ĉu fidi plene la amason aŭ unue sin mem,” respondis li. Tamen, tiun lian diron mi ne komprenis tiom profunde tiutempe, kaj sekve okazis jena afero. Dum studo pri produkta plano por aprilo, konsiderante pri la stato de livereblaj akcesoraĵoj kaj kruda materialo, mi opiniis ke ni povas nur taski riparon de 28 lokomotivoj, sed malgranda Dong opiniis ebla riparon de 35 lokomotivoj rezonante ke post la kritikado kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov, la vasta amaso multe progresis en ideologio kaj politika konscio, tial la kreskinta forto en ideologio sufiĉas por venki la malfacilojn en materio. Dum diskutado en la kunveno de la revolucia komitato, ĉiuj konsentis ripari 35 lokomotivojn, kvankam mi dubeme ne havis certecon pri tio. Rezulte, en aprilo nia fabriko antaŭplenumis la taskon.

Tiuj du okazaĵoj profunde min edukis kaj igis min pensi pri multaj aferoj. En 1938 mi komencis

partopreni la revolucion kaj laboris multajn jarojn kiel fabrikestro. Mi devas esti pli sperta ol junaj revoluciuloj, ĉu en revolucio ĉu en direktado de produkto, sed kial mi montriĝas postrestinta? La kaŭzo kuŝas en tio, ke dum traktado de aferoj, mi fidis nur min mem, sed ne povas agi kiel kamarado Dong, kiu havas en siaj okuloj la amason. Kun tiu ĉi demando mi studis la koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ kaj trovis, ke dum longa tempo mi ne povis ĝuste trakti la amason pro tio, ke en la fundo de mia animo troviĝas du vortoj, nome “veteraneco” kaj “rangeco”, kiuj tuj elmergiĝas ĉe konvena ŝanco, tiel ke ĉiam opiniante min veterana kadro kaj fabrikestro, mi malestimas la amason kaj junulojn. Estas danĝere, se mi ne forigas sub la helpo de la revolucia amaso, sed lasas disvolviĝi tiujn du burĝonojn, kiuj disigos min de la amaso. De tiam, mi senĉese luktis kontraŭ la pensoj pri “veteraneco” kaj “rangeco” en mia cerbo; kiam mi alfrontis iujn demandojn, mi unue iris en la amason por fariĝi lernanto aŭ invitis ilin studi la demandojn kune kun mi. Por kontentigi la bezonojn de produkto kaj varmigado dum vintro en la kuranta jaro, ni unue decidis konstrui novan kaldronegejon por la energia produktaĵo. Sed, komparante tiun decidon kun la instruo de Prezidanto Maŭ “**plie ŝpari en faro de revolucio**”, ni sentis ion nepravan en tio. Kion fari? Tiam, mi iris en la amason, invitinte ankaŭ la respondeculojn de la revolucia komitato de energia produktaĵo al la hejtista grupo. Kaj tie ni interkonsiliĝis kune kun la laboristoj kaj fine elpensis rimedon, kiu konformas tiel al la principo de ŝparo kiel al la bezonoj de produktado kaj varmigado. Nun, lernante la instruon de Prezidanto Maŭ ke “**la amaso estas vera heroo**”, mi sentas apartan intimecon, kaj pli profunde komprenas, kial Prezidanto Maŭ konfirmis kiel unu el la tri punktoj de la fundamenta sperto de la revolucia komitato ke “**. . . en ĝi estas reprezentantoj de la revolucia amaso**”. Por esti inda revoluciulo ĝis la vivfino, mi devas sincere lerni de la reprezentantoj de la revolucia amaso, kondukti modeste kiel lernanto de la amaso, ĉiam teni intiman kontakton kun la amaso, kaj revolucii ĝis la fino, ĉiam strikte sekvante la grandan ĉefkomandanton Prezidanto Maŭ.

*Konstanta membro de la Revolucia Komitato de Ginan-a Lokomotiva Fabriko.

Rakonto pri Malŝarĝo de Varŝipo "Zamenhof"

LA proletara revoluciularo de la Ŝanhaja Haveno de Ĉinio plenumis en la daŭro de 20 horoj kaj 50 minutoj la taskon de malŝarĝo de grandaj kaj pezaj objektoj, kiun la progresintaj havenoj en Eŭropo bezonas kvin ĝis ses tagojn por plenumi, kaj tiamaniere enskribis novan paĝon en la historion de ŝarĝo kaj malŝarĝo de ŝipoj de la mondo.

En la mezo de junio la pollanda varŝipo "Zamenhof" ekankris ĉe la 9-a laborsekcio de la Ŝanhaja Haveno kaj atendis malŝarĝigon de grandaj kompletoj da instalaĵoj pezantaj 1,500 tunojn. En la 17-a, kiam la koncernaj personoj de la haveno kaj la varŝipo interparolis pri la tempodaŭro de malŝarĝo, la kapitano diris, ke por malŝarĝi tiujn kompletojn da instalaĵoj en Eŭropo oni ordinare bezonas du semajnojn, kaj eĉ en la progresinta haveno tio bezonas kvin ĝis ses tagojn. Li opiniis, ke en Ĉinio la malŝarĝado bezonos almenaŭ dek tagojn.

La reprezentanto de niaj laboristoj diris: "Ni malŝarĝos ĉion en la daŭro de kvar tagoj."

La kapitano diris: "Se vi povos plenumi la malŝarĝon en kvar tagoj, mi estos preta restadi du monatojn pli longe en la Ŝanhaja Haveno por vidi, kiel vi..." Evidente, la kapitano estis dubema pri la aserto de la reprezentanto de niaj laboristoj.

La novaĵo disvastiĝis. Plenaj de batalspirito kaj energio, la vastaj laboristoj kaj oficistoj de la 9-a sekcio atendis la alvenon de tiu ĉi tasko. Antaŭ la komenciĝo de la laboro, ili staris antaŭ la grandega portreto de Prezidanto Maŭ kaj ĵuris: "Ni estos ĉiam fidelaj al Prezidanto Maŭ kaj gajnos gloron por la patrio!"

Depost la komenco de la granda proletara kultura revolucio la klasa konscio kaj la konscio pri la batalo inter du linioj de la laboristoj de la haveno multe plialtiĝis dank' al amasaj studo kaj kritiko. Kunlige kun la batalo kaj kritiko kontraŭ la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en sia propra institucio la vastaj laboristoj de la 9-a sekcio kritikis serion da reakciaj absurdaĵoj distruptitaj de la ĉina Ĥruŝĉov, kiaj "materia stimulo", "profito en komando", "sistemo de unuestreco", "filozofio pri rampismo" k. s. Ilia entuziasmo en revolucio kaj produktado multe plialtiĝis. La revoluciaj laboristoj de la haveno ankaŭ pli fervore klopodis lerni el la brilaj heroaĵoj de kamarado Men He. Kun la profunda klasa sento de senlima fideleco al Prezidanto Maŭ la vastaj havenaj laboristoj de la 9-a sekcio varme disvolvis la aktivadon de fideleco al Prezidanto Maŭ, al la penso de Maŭ Zedong kaj al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Ili decidis antaŭtempe plenumi la taskon malŝarĝi la varŝipon.

La 20-a estas la unua tago de la malŝarĝado. Ruĝaj flagoj flirtis sur la bordo de Huangpu-rivero. Ĉie sur la doko troviĝis grandaj afiŝoj kun la slogano "Ni estos ĉiam fidelaj al Prezidanto Maŭ kaj nepre malŝarĝos la varojn de la ŝipo 'Zamenhof' en kvar tagoj".

Ĉe la doko estis pordo-arganoj, naĝantaj arganoj kaj multaj kuplitaj ŝarĝaŭtoj, ŝovetveturiloj, kamionoj, platŝarĝaŭtoj... ĉiuj pretaj ĵeti sin en la batalon.

Je tri kvaronoj post la kvina eksonis la majesta melodio *Ruĝas la Oriento* sur la doko. Alte svingante ruĝajn libretojn *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kaj laŭte kriante la ĵuron "En ĉio ni pensas

pri Prezidanto Maŭ, en ĉio ni obeas al Prezidanto Maŭ, en ĉio ni strikte sekvas Prezidanton Maŭ, kaj en ĉio ni agas por Prezidanto Maŭ”, la laboristoj-ŝarĝistoj iris respektive al sia laborposteno.

Komenciĝis la intensa malŝarĝo. En la kvina holdo oni devis malŝarĝi grandajn partojn de elektro-produkta instalaĵo, kaj la pezo de ĉiu el ili estas ĉirkaŭ 20 tunoj. En la pasinteco oni bezonis almenaŭ unu ĝis du horojn por elŝipigi ĝin. Sed en tiu tago, sub la aktiva kunlaboro de la manipulisto de la naĝanta argano, oni uzis nur iom pli ol dek minutojn por malŝarĝi unu el tiuj partoj. En la daŭro de ĉirkaŭ dek horoj ili malŝarĝis 96 diversformajn superpezajn partojn. En la dua holdo la unua ŝarĝgrupo trovis grandajn ŝtalglobojn, ĉiu el kiuj kun diametro de pli ol du futoj pezas 400 kg. Ili estis nek porteblaj nek ligeblaj, kaj sekve ekzistis multaj malfaciloj. Tiam la laboristoj diris: “Tempo estas venko. Ni devas batalakiri ĉiun minuton kaj ĉiun sekundon!” Per la spirito de la Malsaĝa Avo translokigi la montojn, ili fine sukcesis porti kelkcent grandajn ŝtalglobojn sur la bordon. Kun alta batalvolo la ĉinaj havenaj laboristoj malŝarĝis per tia rapideco, kian neniam vidis la eksterlandaj maristoj. Tiutempe, la lastaj ankaŭ opiniis, ke la tasko povis esti plenumita en malpli ol kvar tagoj.

Sed la koncerna persono de la varŝipo elmetis novan postulon, ke la kromaj 1,200 tunoj da monito ankaŭ devas esti malŝarĝitaj en la ĉinaj kvar tagoj. Eble iuj pensas, ke tiuj aldonaj 1,200 tunoj da varo povos haltigi la altrapidan progreson de la ĉinaj laboristoj. Do, lasu nin vidi, kiel la ĉinaj laboristoj esprimis sian decidon. La junaj laboristoj de la kvara grupo diris: “Kelkobligu tiujn 1,200 tunojn, kaj ni malŝarĝos ĉiujn en la difinita tempo!” “Ni havas neelĉerpeblan energion, ĉar la penso de Maŭ Zedong nin gvidas en la batalo!”

Malŝarĝado iris en plena streĉo. La arganoj senĉese svingis siajn ferajn brakojn. Veturiloj fluge navedis. La dokaj laboristoj ritme horukis:

Tenu revolucion, haŭ — haj,
Stimulu produkton, haŭ — haj,
Taskon kvartagan, haŭ — haj,
Ni finu unutage, haŭ — haj!

Diversaj heterotipaj, superpezaj partoj estis senhalte elŝipigitaj sur la bordon, kaj la akvomezurilo de la dekmil-tonela varŝipo “Zamenhof” iom post iom leviĝis. La planisto de la 9-a sekcio diris ekscitite: “Laŭ plano estis 350 tunoj por la meza deĵoro, sed fakte malŝarĝitaj estas 1,994 tunoj! La ekstrema

laborentuziasmo de la kamaradoj jam disrompis entute mian planon. La alta politika konscio de la kamaradoj fidelaj al Prezidanto Maŭ neniel estas mezurebla per ia ajn plano.”

Dum la malŝarĝado la kamaradoj de diversaj flankoj agis en strikta kunlaborado. La grupo de transportaj instrumentoj tagnokte tenis ĉiujn instrumentojn en pretiĝo; la kablo-grupo sturme klopodis dum sinsekvaj tagoj por prepari diversspecajn ŝtalajn kablojn; la kamaradoj de la meĥanikaĵo-fako venis al la loko por rapidigi la riparon de maŝinoj; la laboristoj de la manĝejo sendis al la loko manĝojn por la doklaboristoj; la kadroj de la oficejo sendis al ili teon kaj viŝtukojn; la kamaradoj de la politik-propaganda fako venis por propagandi la penson de Maŭ Zedong; la novaj kaj malnovaj kadroj de la revolucia komitato ankaŭ partoprenis la laboron de malŝarĝado. Tia amasa kunlaboro multe akcelis la plenumon de la tasko. Je kvindek minutoj post la dua en la mateno de la 21-a, ĉiuj varoj, inkluzive la 1,200 tunojn da monito, estis malŝarĝitaj de la varŝipo “Zamenhof”.

Post la plenumo de la tasko la eksterlandaj maristoj eksterordinare kortuŝiĝis. La maristoj de la varŝipo “Zamenhof” okazigis tekunsidon por la havenaj laboristoj en la mateno de la 21-a. Parolante pri la surpriza rapideco de la malŝarĝado fare de la ĉinaj laboristoj, la reprezentanto de la ŝipo diris: “Tre alta estas la teknika nivelo de la ĉinaj laboristoj en ŝarĝado kaj malŝarĝado.” La kapitano, kiu propraokule rigardis la batalon de malŝarĝado de la komenco ĝis la fino, rimarkis: ”La ĉinaj laboristoj havas altan konscion. Jen estas la unua fojo depost mia okupiĝo pri navigacio, ke mi trovis tian surprizan rapidecon de malŝarĝado de grandaj objektoj. Tio estas ja miraklo. Eĉ ĉe Rotterdam, la plej progresinta haveno en Eŭropo, tia malŝarĝado ankaŭ bezonas kvin ĝis ses tagojn.” Tiutempe, la havenaj laboristoj havis milojn da vortoj por diri, sed ili kunigis tiujn ĉiujn en unu frazon: Dank’ al la granda penso de Maŭ Zedong kiu nin gvidas en agado ni ĉinaj havenaj laboristoj povas nevenkeble marŝi antaŭen! Kiam la proletaraj revoluciuloj de la 9-a sekcio de la Ŝanhaja Haveno foriris per heroaj paŝoj kun triumfa gloro, laŭte kantante *Marnavigo Dependas de la Stiristo* kaj mansvingante por adiaŭi la eksterlandajn maristojn, ĉiuj maristoj de la pollanda varŝipo “Zamenhof” ekstaris kaj salutis. Rigardante la ridetantajn vizaĝojn de la ĉinaj havenaj laboristoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong, ili senĉese kapjesis por esprimi sian respekton kaj admiron.



Firma Subteno al la Vjetnama Popolo por Akiri Kompletan Venkon

Kara kamarado Nguyen Van Kinh,

Ni legis en junio la "MESAGĜON al la tutmonda esperantistaro, ano de la progresema homaro" de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio. Ĝi per multaj faktoj malkaŝis la novajn krimojn de la usonaj agresantoj, kiuj trompas per falsa pactraktado por pliintensigi sian veran agresmiliton kontraŭ Vjetnamio, kaj samtempe esprimas firman volon de la vjetnama popolo sentima al ĉiaj oferoj por konduki la nacisavan militon kontraŭ Usono ĝis la fino. Ĉiuj kamaradoj de nia redakcio forte kondamnas kun senkompara indigno la intrigon de la usona imperiismo intensigi la militon en Vjetnamio unuflanke kaj trompi per falsa pactraktado aliflanke, kaj firme subtenas la vjetnaman popolon konduki la nacisavan militon kontraŭ Usono ĝis la fino.

De pluraj jaroj, la damninda usona imperiismo furioze bombas kaj bombardas nordan Vjetnamion, vane provante ŝanceli la decidemon de la vjetnama popolo en ĝia nacisava batalo kontraŭ Usono kaj malhelpi la subtenon de la popolo de norda Vjetnamio al siaj samsangaj fratoj en la sudo, por tiamaniere savi sin el treege pezaj malvenkoj en suda Vjetnamio. Sed la 31-miliona vjetnama popolo ne estas timigita de

bomboj kaj pafiloj de la malamiko; kontraŭe aktive respondante al la granda alvoko de Prezidanto Ho Chi Minh batali kontraŭ Usono por savi la patrion, ili vaste levigis por heroe kontraŭbatali la usonajn agresantojn kaj akiris unu grandan venkon post alia, donante pezajn fraĵojn al la usonaj, plej ferocaj bandidoj en la mondo. De la kuranta jaro, la heroa vjetnama popolo plie disvolvas la spiriton decideme batali kaj venki kaj jam faligis 3000 usonajn piratajn aviadilojn (de la 5-a de aŭgusto, 1964, ĝis la 25-a de junio, 1968) en norda Vjetnamio; ekde la printempo de ĉi tiu jaro, sub la saĝa gvido de la Sudvjetnama Nacilibera Fronto, la popolo kaj armeo de suda Vjetnamio faras sinsekvajn senprecedence grandskalajn, plenampliksajn atakojn kontraŭ la malamiko kaj akiris senprecedence grandajn venkojn, tiel ke la usonaj agresantoj trovas por si neniun elirejon kaj falis en plenan embarason. Ilia malvenko estas jam neŝanĝebla destinita.

La venko de la vjetnama popolo estas granda venko de popola milito. Ĝi ege kreskigis la batalvolon de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo kaj samtempe ege debatis la arogantecon de la imperiismo, reviziismo kaj reakciularo, kaj forte

antaŭenpuŝis la revolucionan batalon de la tutmondaj popoloj kaj starigis brilan ekzemplon por la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de diversaj landoj batalantaj por sia liberigo. Ni varme gratulas la vjetnaman popolon pro ĝiaj brilaj atingoj, kiuj multe nin ĝojigas kaj kuraĝigas.

La tagoj de la usonaj agresantoj por resti en Vjetnamio estos nemultaj. Tamen, ĝuste kiel nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris en sia gratula telegramo sendita al Prezidanto Nguyen Huu Tho je 19-a de decembro, 1967: "Baldaŭ pereonte, ĉiuj reakciaj fortoj ĉiam faras antaŭmortajn baraktojn. Ili nepre sin turnas al milita aventuro kaj politika trompo per ĉiuj rimedoj por savi sin el pereco."

De la kuranta jaro la usona imperiismo, unuflanke, intensigas la militadon, sendas grandnombre trupojn al suda Vjetnamio kaj pli senbride bombas kaj bombardas sudan kaj nordan Vjetnamion; aliflanke, sub la strikta kunagado de la sovetuniaj reviziistoj, ĝi klopodas trompi per la intrigo de "pactraktado" por ĉasi ĉe la tablo de traktado kion ĝi ne sukcesis akiri sur la batakampo. La usonaj imperiistoj ĉiam aplikas du kontraŭevoluciajn manovrojn de milita aventuro kaj politika trom-

po por savi sin el la malvenko en Vjetnamio.

La vjetnama popolo malkovris tiun intrigon de la usonaj agresantoj. Ĝuste kiel la granda gvidanto de la vjetnama popolo Prezidanto Ho Chi Minh montris, nun "la usonaj imperiistoj, kvankam suferantaj grandajn malsukcesojn en Vjetnamio, izolitaj kaj konfuzitaj tiel en la mondo kiel en Usono mem, restas tre cinikaj kaj trompemaj. Ili estas parolantaj pri 'paca traktado', dum ili antaŭenpuŝas la militon". Prezidanto Ho Chi Minh solene alvokas al la tuta vjetnama popolo, "ankoraŭ pli streĉe unuiĝi, ĉiam akriĝi sian singardemon kaj firmigi sian decidemon batali kaj venki, disvolvi siajn fortajn punktojn kaj korekti siajn malfortajn punktojn, superi ĉiujn elprovojn kaj siniferojn, konstante batali sur ĉiuj batalkampoj, por akiri novajn kaj

ankoraŭ pli grandajn venkojn. Ĉar ambaŭ Nordo kaj Sudo restas unuanimaj kaj konkuras ekstermi la malamikon por patria savo, certe la usonaj agresantoj komplete malvenkos."

El via mesaĝo ni ĝoje vidas, ke responde al la alvoko de Prezidanto Ho Chi Minh, la tuta vjetnama popolo pli streĉe unuiĝas, persistas pri longdaŭra militado kaj heroe batalas por la granda celo komplete venki la usonajn agresantojn kaj liberigi la tutan Vjetnamion. Ni profunde kredas, ke kvankam la vjetnama popolo ankoraŭ renkontos diversajn malfacilojn antaŭ sia fina venko, tamen, neniu ajn malfacilo povos malhelpi la vjetnaman popolon batalakiri la kompletan venkon.

Kara kamarado, Ĉinio kaj Vjetnamio estas najbaraj landoj kun intima rilato inter si kvazaŭ lipoj

kaj dentoj, kaj niaj du popoloj estas fratoj, kiuj dividas inter si feliĉon kaj malĝojon. La sepcent-miliona ĉina popolo hardita en la ŝtormo de la granda proletara kultura revolucio decidis teni pli alte la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj firme subteni la liberigan batalon de la vjetnama popolo kaj de ĉiuj landoj kaj popoloj, kiuj suferas la subpremon kaj ekspluaton de la usona imperiismo, por forpeli la usonajn banditojn el Vjetnamio, el Azio, Afriko kaj Latinameriko, kaj el Eŭropo kaj Oceanio! For la usonan imperiismon kaj ĝiajn komplikojn!

Vivu la batala unuiĝo inter la ĉina kaj vjetnama popoloj!

Venke definitive apartenos al la heroe vjetnama popolo!

La Red. de EPC

FANMEJ:

Bankrotis la "Aera Supereco"

—Pri la faligo de 3,000 usonaj aviadiloj en tri jaroj fare de la armeo kaj popolo en norda Vjetnamio

LA armeo kaj popolo en la provinco Quang Binh en norda Vjetnamio faligis en la 25-a de junio usonan rabistan aviadilon. Tio estas la 3000-a usona rabista aviadilo, kiun la armeo kaj popolo en norda Vjetnamio faligis de post la 5-a de aŭgusto, 1964. Tio estas granda venko de la popola milito, granda venko de la ŝtala volo de la armeo kaj popolo en norda Vjetnamio, kiuj respondas al la alvoko de prezidanto Ho Chi Minh rezisti la usonan agreson kaj savi la patrion por decide venki la usonajn rabistojn.

En la 5-a de aŭgusto, 1964, la usonaj imperiismaj agresantoj kreis la fifaman incidenton de la golfo Bac Bo kaj plivastigis la agresan militon en suda Vjetnamio al la nordo, intencante ŝanceli la decidon de la popolo de la du partoj de Vjetnamio rezisti la usonan agreson kaj savi sian patrion. Ili provis sin savi el sia peza fiasko en suda Vjet-


namio malhelpante la popolon en norda Vjetnamio doni subtenon al la parencaj samlandanoj en la sudo. De post la 7-a de februaro, 1965, la bombado fare de la usona imperiismo kontraŭ norda Vjetnamio fariĝis ankoraŭ pli intensa. La faktoj dum la pasintaj pli ol tri jaroj pruvis, ke la bomboj de la usona imperiismo ne nur ne povis timigi la heroan popolon de Vjetnamio, sed kontraŭe, la "aera supereco", kion ĝi fanfaronis, jam estis frakasita kvazaŭ sapveziko sub la bato de la fera pugno de la brava vjetnama popolo. La 3,000 aviadiloj faligitaj inkluzivas 16 tipojn kaj 47 formojn — de B-52 bombaviadiloj ĝis diversspecaj batalbombaj jetoj kaj de elektronrekognoskaj aviadiloj ĝis senpilotaj spionaviadiloj. Du F-111A aviadiloj, kiujn la usona imperiismo fanfaronis kiel la "plej sorĉajn" kaj "plej modernajn", estis faligitaj de la armeo kaj popolo de norda Vjetnamio tuj post kiam ili estis ekspeditaj al la batalkampoj.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: “La plej riĉa fonto de povo por fari militon kuŝas en la popolamasoj.” Dum la batalo en norda Vjetnamio ne nur la aerdefendaj trupoj faris meritoplenajn servojn, sed ankaŭ la milico-memdefendaj taĉmentoj kreis grandajn kontribuojn. Ĉie, ĉu en la fabrikoj de urboj, ĉu sur la kamparo, ĉu ĉe la pramejoj survoje al la fronto, ĉu en fiŝŝipoj sur la maro, membroj de la milico-memdefendaj taĉmentoj kun pafiloj sur la dorso estas ĉiam pretaj al batalo. Kune kun la aerdefendaj trupoj ili formas densan fajroretan, tiel ke la usonaj rabistaj aviadiloj falas en la vastan maron de la popola milito, apenaŭ ili sin trudas en la nordon de Vjetnamio. 246 el la 3,000 aviadiloj estis

faligitaj de la gemembroj de la milico-memdefendaj taĉmentoj.

En la pasintaj pli ol tri jaroj la armeo kaj popolo en norda Vjetnamio eltenis provon kaj sin hardis des pli firmaj kaj bravaj en la batalo kontraŭ la agreso de la usona imperiismo. Krom batali heroe kontraŭ la usonaj aeraj kaj maraj piratoj, ili ankaŭ konkeris diversajn malfacilojn kaj diligente okupis sin pri produktado sub detruado fare de la malamiko, kaj tiamaniere garantiis la bezonojn de la milito kaj popola vivo.

Ĉiuj, ĉu junuloj aŭ maljunuloj, ĉu batalantoj de la popola armeo aŭ membroj de la milico-memdefendaj taĉmentoj, kiujn mi renkontis dum mia vizitado en Vjetnamio, estas plenaj de fido pri sia venko super la usona imperiismo. El sia propra sperto ili konstatis, ke la usona imperiismo estas papertigro kaj ke ĝi povos esti venkita per la potenco de la popola milito. Veterana gerilano, kiu partoprenis la rezistmiliton kontraŭ la francaj koloniistoj, diris al mi: “En la pasinteco ni venkis la francajn koloniistojn, kaj hodiaŭ Vjetnamio jam fariĝas multe pli forta. Ni havas la subtenon de Prezidanto Maŭ kaj la sepcentmiliona ĉina popolo, kaj ni certe komplete venkos la usonan imperiismon.” Estro de subplotono de artilerio de la popola armeo diris: “Estas nenio timinda en la modernaj usonaj aviadiloj, kaj ni same dispecigas ilin. Alprenante la strategion de la popola milito ni certe venkos la usonajn agresantojn, liberigos la sudon kaj unuigos la patruon.”



La “aera supereco” de la usona imperiismo bankrotis kun rubiĝo de ĝiaj maŝinoj antaŭ la heroaj armeoj kaj popolo de Vjetnamio.

Nova Vekiĝo de la Jugoslavaj Studentoj

SUB la influo de la grandioza ŝtormo de la revoluciaj amasaj movadoj en Francio, Eŭropo kaj Norda Ameriko, al ribelo leviĝis la jugoslavaj junaj studentoj. Ili elmetis batalecajn politikajn sloganojn, kiaj “Kontraŭ pseŭdosocialismo!” “For la ‘ruĝan’ burĝaron!” “Kontraŭ restaŭro de kapitalismo!”, kaj forte atakas la reakcian regadon de la Tito-kliko. La leviĝo de la studenta movado en Jugoslavio estas nepra rezulto de la serioza profundigo de la politika kaj ekonomia krizo kaj la tagon-post-taga akriĝo de la kontraŭdiroj inter la enlandaj klasoj.

Sin dependigante al imperiismo internacie kaj restaŭrante kapitalismon enlande, la Tito-kliko senĉese profundigis la politikan kaj ekonomian krizon en Jugoslavio. La “plenampleksa ekonomia reformo” perforte praktikata de la Tito-kliko tra la tuta lando ekde 1965, kiu plie kapitalismigas kaj koloniigas Jugoslavion, pli malbonigis ĝian enlandan ekonomion kaj pli intensigis la klasajn kontraŭdirojn. Laŭ oficiala materialo de la jugoslava reviziismo, la jara kreska procento de la jugoslava industria produkto de 1965 estis 8 procentoj, tiu de 1966 reduktiĝis je 4 procentoj kaj tiu de 1967 estis 0.4 procenton pli malalta ol tiu de 1966. Sekve de kapitalisma inundo kaj dumpingo de usonaj superfluaĵaj agroproduktaĵoj, la agrikultura produktado en la jugoslava kamparo stagnas de longe. Ĉiujare Jugoslavio sin vivtenas per granda

kvanto da importita tritiko. La meznombraj pokapaj produktkvantoj de maizo, ovoj, lakto kaj aliaj agrikulturaj kaj brutaj produktaĵoj estas pli malaltaj ol tiuj antaŭ la milito.

La pliserioziĝo de la ekonomia kaj financa krizo en la kapitalisma mondo profunde influis la jugoslavan ekonomion, tiel ke la tagoj de la Tito-kliko fariĝis ankoraŭ pli malfacilaj. Nun la Tito-kliko havas ŝuldon de 1.8 miliardoj da usonaj dolaroj al fremdlandoj kaj estas unu el la plej grandaj debitoroj en la mondo. La reviziisma kliko de Jugoslavio kriis kun konsterniĝo: La ekonomia krizo en la kapitalisma mondo kreis “pli malfacilajn kondiĉojn” por la ekonomio de Jugoslavio.


Por sin liberigi el la malfaciloj kaj transŝargi la krizon, la Tito-kliko ekspluatas la laborantan popolon ĉiamaniere. Ili faris serion da reakciaj aranĝoj kiaj malaltigo de salajroj, maldungo de laboristoj, altigo de prezoj kaj fermo de entreprenoj, kio serioze minacas la vivtenon de la jugoslava laboranta popolo. Laŭ informo de jugoslava gazetaro, granda nombro da laboristoj estas maldungitaj en la lastaj jaroj pro anekso kaj bankroto de entreprenoj. Nun, la nombro de la senlaboruloj en la tuta Jugoslavio jam atingis pli ol sescent mil kaj krome tricent mil homoj estis devigitaj forlasi

sian hejmlandon por serĉi vivrimedon alilande. Kaj la senlabora problemo ĉe la junularo estas eĉ multe pli serioza. La jugoslava reviziisma ĵurnalo *Borba* konfesis, ke je la fino de la kuranta jaro kvarcent dudek mil junuloj estos senlaboraj. La fakto, ke tiel kolosa armeo de senlaboruloj troviĝas en lando kun nur dudek milion loĝantoj, montras ke la laboranta popolo de Jugoslavio vivas mizerege sub la kruelaj subpremado kaj ekspluatado de la Tito-kliko. Tiel same estas la vivo de ĝiaj kamparanoj. La Tito-kliko konfesis: "La ekonomia reformo plirapidigis distavoliĝon en la kamparo", "iuj kamparanaj familioj fariĝis produktantoj de komercaĵoj, dum aliaj perdis sian vivrimedon", "40 procentoj de la kamparana familio apenaŭ povas sin vivteni... kaj fariĝis viktimoj de uzuro en la kamparo."

Kie estas subpremo, tie estas kontraŭstaro; kie estas ekspluatado, tie estas batalo. De la lastaj jaroj disvolviĝas kun ĉiu tago la batalo de la vastaj

laboristaro kaj kamparano por defendi siajn fundamentajn rajtojn kontraŭ ekspluatado kaj subpremado. Statistiko kun evidente malgrandigitaj ciferoj publikigita en jugoslava ĵurnalo informis, ke en la lastaj kvin jaroj okazis en la tuta Jugoslavio pli ol 1,100 strikoj de laboristoj. En la jaro 1967 okazis eĉ pli oftaj strikoj de laboristoj en ĉiuj partoj de la tuta lando. Laboristoj de iuj fabrikoj manifestaciis sur la stratoj kun sloganaj tabuloj kun la surskribaĵoj kiaj "Ni postulas laboron!" kaj "For la fabrikan administran komitaton!" Kaj laboristoj de iuj fabrikoj eĉ alprenis tre drastan rimedon, nome draŝi la hundojn de la Tito-kliko instalitajn en la fabrikoj. En tiu jaro, ankaŭ la laborantaj kamparanoj en diversaj partoj de la jugoslava kamparo leviĝis unuj post aliaj por oponi kontraŭ impostoj kaj la krimago de la Tito-kliko en anekso de kamparanaj agroj fare de la t. n. "ŝtataj farmejoj". Ĉio ĉi tio plene reŝpegulas, ke la vasta laboranta popolo de Jugoslavio vekigis tagon post tago.

Jugoslavaj studentoj mitingas en la dormeja distrikto por indigne protesti kontraŭ la sanga subpremado de la jugoslava reviziisma kliko al la studentoj.



Kia Varo Estas la “Traktato pri Nedisvastigo de Nukleaj Armiloj”?

SPIITE al la forta opono de Albanio, Tanzanio k. a. landoj kaj la serioza sindeteno de voĉdono fare de multaj aziaj kaj afrikaj landoj, UNO devige aprobis la t. n. “Traktaton pri Nedisvastigo de Nukleaj Armiloj” kune elkovitan de Usono kaj USSR, sub kontrolado de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo, kaj sankciis tiun grandan intrigon kaj trompon per la sigelilo de UNO. Tio estas grava paŝo de la usona imperiismo en antaŭenpuŝo de ĝia kontraŭrevolucia tutgloba strategio kaj unu plia nerefutebla atesto pri la perfido de la sovetunia reviziisma renegata kliko al la interesoj de la tutmondaj popoloj.

Kia varo do estas la t. n. “Traktato pri Nedisvastigo de Nukleaj Armiloj” analizite ĝis la fino? Por diri malkaŝe, ĝi estas sinvenda atestilo altrudita de Usono kaj Sovetunio al la landoj, kiuj ne havas nukleajn armilojn. Tiu ĉi traktato kondiĉas, ke ĉiu ajn el la subskribintaj landoj de la traktato, posedanta nukleajn armilojn ne devas rekte aŭ pere havigi aŭ kontroli nukleajn armilojn al landoj, kiuj ne havas tion; kaj ke ĉiu ajn sennuklea lando ne devas fabriki, akcepti aŭ kontroli nukleajn armilojn. Kaj la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo ne nur povas fabriki, akumuli nukleajn armilojn kaj disvastigi nukleajn bazojn, sed ankaŭ absolute ne prenas sur sin la respondecon malpermesi uzon de nukleaj armiloj kontraŭ la sennukleaj landoj. Evidente, tio signifas permesi nur al la nukleaj tiranoj Usono kaj Sovetunio monopoligi nukleajn armilojn kaj krome devigi la aliajn landojn rekoni ilian pozicion de nuklea hegemonio, por ke ili havu la privilegion fari nu-

kleajn ĉantaĝojn. Do tiu ĉi traktato estas centpocenta produkto de la potenco-politiko de la grandaj landoj, centpocenta traktato de malegaleco, sed absolute ne “rimedoj” por “garantii la sekurecon de la popoloj” kiel distrumpetas la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo!

La t. n. “Traktato pri Nedisvastigo de Nukleaj Armiloj” elkovita de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo estas ne nur manifestiĝo de tiraneco ignoranta la suverenecon de la aliaj landoj, sed ankaŭ konsistiga parto de ilia kuna aktivado por oponi Ĉinion. En oktobro de 1964, Ĉinio sukcese eksplodigis sian unuan atombombon kaj sukcese faris poste eksperimentojn pri hidrogena bombo kaj telestirata nuklea armilo. Por kune oponi Ĉinion, Usono kaj Sovetunio pliintensigis sian koluzion rilate al la problemo de “nedisvastigo de nukleaj armiloj”. Kiam Kosigin kaj Johnson rekte kovis la grandan intrigon de kontraŭrevolucia tutgloba strategio en la lasta tagdeko de junio, 1967, “nedisvastigo de nukleaj armiloj” jam estis unu el la ĉefaj temoj pritraktataj de ili. Johnson deklaris publike, ke li kaj Kosigin “unuanime opinias, ke estas tre grave, ke internacia interkonsento estas atingita rilate al traktato pri nedisvastigo (de nukleaj armiloj)”, kaj konkludis negocon en tiu sekreta interparolo. Sekve do la vipura “Projekto de Traktato pri Nedisvastigo de Nukleaj Armiloj” kune elkovita de Usono kaj Sovetunio estis elkaĝigita, kun vana espero inciti kontraŭĉinan sentimenton internacie. Samtempe, la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo elmetis en komploto kun Britio la “Interkonsenton”

pri dono de "nuklea protekto" al la sennukleaj landoj, kiuj subskribis al la traktato, plenenergie liveras "nuklean protekton" al la hinda reakciularo por formi el sentaŭgajoj ĉirkaŭferman rondon kontraŭ Ĉinio kaj kune oponi Ĉinion en militaj aferoj.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **"La atombomboj kaj hidrogenaj bomboj en la manoj de la usona imperiismo ja ne povas timigi la homojn, kiuj ne volas sklaviĝi."** La usona imperiismo kaj

sovetunia reviziismo opinias, ke la paperpeco de la "Traktato pri Nedisvastigo de Nukleaj Armiloj" sufiĉas por tenadi ilian monopolan pozicion de nukleaj armiloj kaj bari la revolucion tajdon de la mondaj popoloj. Sed tio estas nur sonĝo! La monopola pozicio de nukleaj armiloj de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo delonge jam estis rompita. Per nukleaj armiloj ili ja ne povas subpremi la batalon de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo, nek povas sin savi de la sorto de pereco.

Intermordado de Hundoj

KUN la sinsekvaj seriozaj malvenkoj de la usona imperiismo en sia agresa milito kontraŭ Vjetnamio, la malkaŝa batalo por potenco kaj profito interne de la pupa kliko de Nguyen Van Thieu kaj Nguyen Cao Ky ĉiam pli kaj pli akriĝas. Por forpuŝi rivalajn elementojn kaj teni sian ŝanceliĝantan reakcian regadon, la pupa "prezidanto" Nguyen Van Thieu antaŭnelonge eksigis nombron da fidelaj sekvantoj de la pupa "vicprezidanto" Nguyen Cao Ky, kiuj okupis gravajn postenojn militajn kaj ŝtatajn.

Antaŭ nelonge, tuj post kiam Nguyen Van Loc, subtenanto de Nguyen Cao Ky, estis forpuŝita de sia seĝo de pupa "ĉefministro", Nguyen Van Thieu petis sian fidelan sekvanton Tran Van Huong formi novan pupan kabineton kaj tiamaniere ekskluzivis kelkajn malnovajn ministrojn, kiuj havas intimajn rilatojn kun Nguyen Cao Ky. Poste, Nguyen Van Thieu kune kun Tran Van Huong deoficigis, unun post alia, la pupan "komandanton de saĝona milita distrikto" Le Nguyen Khang, la pupan "urbestron de Saĝono" Van Van Cua kaj la pupan "ĉefon de la ŝtata polico" Nguyen Ngoc Loan, kiuj ĉiuj estas subtenantoj de Nguyen Cao Ky. La vakantaj oficoj estis tuj plenigitaj per la propraj intimuloj de Nguyen Van Thieu,

kiu grave reduktas la pozicion de Nguyen Cao Ky. La okcidentaj novaĝ-agentejoj malkovris, ke Nguyen Van Thieu intencas eksigi ankaŭ la pupan "ĉefon de kunigita stabo" Cao Van Vien, alian intimulon de Nguyen Cao Ky, por doni pluan baton al la lasta.

Kompreneble ankaŭ Nguyen Cao Ky ne volas montri sin cedema, kaj li estas plananta kontraŭrimedojn por respondi al Nguyen Van Thieu. Laŭ okcidentaj novaĝ-agentejoj, en Saĝono cirkulas la onidiro, ke Nguyen Cao Ky baldaŭ "rompiĝos" kun Nguyen Van Thieu. La intermordado de hundoj estas daŭranta.

La ĉiam pli akriĝanta lukto inter la du hundoj bredataj de la usona imperiismo en suda Vjetnamio spegulas la gravan krizon en milito kaj politiko alfrontatan de la kliko de Usono kaj la pupa reĝimo sub la peza bato de la armeo kaj popolo de suda Vjetnamio. Kvankam la usona mastro provas fojo post fojo moderigi la kontraŭdirojn inter siaj lakeoj, tamen la farso de "intermordado de hundoj" interne de la sudvjetnama pupa kliko prezentiĝas ĉiam pli kaj pli intense. Kiel ajn furioze baraktas la ŝanceliĝanta usona-pupa reĝimo, ĝi ne povos eviti sian sorton de kompleta pereco.

Malgranda Helpo de Granda Komplico

LA 30-an de junio unu usona aviadilo plena de usonaj armeanoj senditaj por agresi Vjetnamion estis devigita surteriĝi dum sia flugo al Vjetnamio tra la sovetunia aer-teritorio. Pri tio la sovetunia reviziisma renegata kliko ne kuraĝis informi la sovetian popolon nek publike kondamni per sola frazo, sed eĉ komplezeme lasis ĝin daŭrigi sian vojaĝon rekte al la vjetnama batalkampo je la 4-a de julio. El tio oni povas vidi ke la amikeco de la sovetuniaj reviziistoj-renegatoj al la usona imperiismo estas vere profunda, kaj ilia priservo al la lasta estas senmanke perfekta!

Tiu sklaveca, genufleksa ago farita de la sovetunia reviziisma renegata kliko surprizis eĉ tiujn usonajn oficistojn. En sia telegrama informo de la 1-a de julio, la usona *Associated Press* raportis, ke la oficistoj de Vaŝingtono konjektas ke Moskvo ne liberigos tre baldaŭ tiun usonan aviadilon, ĉar ĝi certe renkontus "severan kritikon" de la popolo de la mondo, se ĝi tion farus. Tamen oni ne atendis, ke por flati siajn usonajn mastrojn, la sovetunia reviziisma kliko nenion bedaŭras, eĉ se ĝi devas perdi plene sian dignon. Precize kiel la popoldiro priskribas: "Moku, se tio plaĉas al vi; tamen lakeo mi definitive fariĝis miaparte."


La sovetunia reviziisma kliko ĉiam ĵuras per la ĉielo, kiel ili "firme" subtenas la vjetnaman popolon. Sed, ĉu montri respekton al la milita aviadilo, per kiu la usona imperiismo transportis siajn armeanojn por agresi Vjetnamion, povas esti konsiderata kiel ia agado de "subteno al Vjetnamio"?

Ĉu tiuj usonaj militistoj veturis ne por masakri, sed male por subteni la vjetnaman popolon?!

Fakte, en la okuloj de la sovetunia reviziisma renegata kliko, tio estas nur "malgranda" komplezo al Vaŝingtono, ke ili liberigis la usonan aviadilon kun pli ol 200 usonaj armeanoj destinitaj por agresi Vjetnamion, lasante tiujn agresantojn buĉi la vjetnaman popolon. La renegata bando de Breĵnev-Kosigin estas propre granda komplico de Usono en ĝia agresado kontraŭ Vjetnamio. Ĝi helpas Usonon "stabiligi" la situacion en Eŭropo kaj klopodas tutforte estingi la revoluciajn fajrojn en diversaj lokoj de la mondo, por ke Usono povu transmovi parton de siaj trupoj al Vjetnamio. La nombro de tiuj armeanoj estas multe pli granda ol 200! Se granda helpo estas jam donita, doni malgrandan helpon kompreneble estas tute nemenciinde.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **"Kontraŭrevoluciuloj vidigas nur falsajn ŝajnojn kaj kovras la veron. Tamen, ĉar ili volas kontraŭi revolucion, ili ja ne povas kovri tute komplete la veron."**

Same kiel ĉiuj reakciuloj, la sovetunia reviziisma kliko estas negativa instruisto, kiu ne postulas salajron. Ili ĉiam senmaskigas sin daŭre per propraj agoj, tiel ke la vastaj popoloj povas pli klare vidi ilian kontraŭrevolucion abomenindan vizaĝon de falsa subteno sed vera perfido kaj leviĝas por pli firme batali kontraŭ ili. Estas sendube, ke tian laboron de negativa instruisto la sovetunia reviziisma renegata kliko certe daŭrigos ĝis sia fina pereco.



USONAJ SOLDATOJ LEVAS ĈIAM PLI ALTAN TAJDON KONTRAŬ LA AGRESA MILITO EN VJETNAMIO

En la lasta tempo, malgraŭ la rigora kontrolo fare de spionoj kaj la faŝisma subpremo fare de reakciaj oficiroj, ĉiam pli multaj usonaj soldatoj disvolvis iom-post-iom diversajn organizitajn aktivadojn kontraŭ la agresa milito en Vjetnamio. Tio senĉese reduktas la batalpovon de la usonaj trupoj, kaj kelkfoje eĉ serioze malhelpis la funkcion de la milita maŝino de la usona imperiismo.

Post la incidento en la pasintjara oktobro, en kiu centoj da soldatoj de la 193-a infanteria brigado ribelis en Fort Hood de Texas kaj rifuzis iri en la agresan militon kontraŭ Vjetnamio, denove okazis soldata ribelo ĉijare en aprilo, en la bazo Fort Campbell de Kentucky. Trupo de soldatoj tuj irona al Vjetnamio faris batalon en pluraj sinsekvaj noktoj, indigne renversis aŭtojn, detruis armean klubon kaj solide batis ĝendarmojn, kiuj ilin tiranadis.

Malgraŭ la rigora kontrolado fare de spionoj, en kaj ekster Usono kaj de ĝiaj agresaj trupoj en Vjetnamio ĝis ĝiaj garnizonaj trupoj en Eŭropo, ĉiam pli da soldatoj forkuris. Oni raportis, ke la usonaj soldatoj, kiuj rifuzis plenumi militan servon, jam nombras pli ol 10,000. Inter ili multaj fuĝis al Kanado, Francio kaj Svedio kaj tie starigis siajn organizojn,

eldonas ĵurnalojn por propagandi al usonaj soldatoj kontraŭ la agresa milito en Vjetnamio.

La nigrulaj soldatoj de Usono, kiuj estas senĉese hardataj kaj kies politika konscio rapide leviĝas en la batalo kontraŭ la perforta subpremo, ludas tre gravan rolon en la batalo kontraŭ la milito. Pli kaj pli da nigrulaj soldatoj klare vidis la senhontan mensogon de Johnson ke ilia militiro al Vjetnamio celas "savi liberon". Iu nigrula soldato, kiu rifuzis iri al la Malproksima Oriento por militservo, diris: "Mi devas resti en Usono, en nigrulaj, malriĉulaj kvartaloj de Detroit, Newark, Ĉikago, Navjorko kaj aliaj lokoj kaj batali por la libero kaj emancipiĝo de la nigruloj. La batalo de la usonaj soldatoj kontraŭ la milito nun peze frapas la usonan imperiismon.

PLI OL DEK MILIONOJ MALSATAS EN USONO

Antaŭnelonge la privatula organizo Civila Enketa Komitato pri Demandoj de Malsato kaj Subnutrado publikigis raporton post naŭmonata enketado. Laŭ nekompleta statistiko, nun en Usono "proksimume 10-14.5 milionoj da homoj suferas malsaton", "malsatantoj troviĝas en ĉiuj lokoj tra la tuta lando, precipe en la sudo kaj la okcidento". Pli ol 250 konteoj en 20 ŝtatoj estas listigitaj kiel "regionoj de malsato". "Gravedaj virinoj de la malriĉaj tavoloj ĝenerale suferas de kronika anemio pro malbona nutrado". Precipe en la sudo kaj la okcidento, "homoj suferantaj de malbona nutrado kaj parazit-malsanoj okupas tre altan proporcion".

Johnson kaj similaj senĉese fanfaronis pri la "prospero" kaj "riĉeco" de Usono. Antaŭ kvar jaroj, kiam li enoficiĝis kiel prezidanto, li blufis pri konstruo de Usono en "grandan socion", ke "ne estu permesate, ke iuj familioj vivu en malespera malriĉeco", nek ke "la infanoj suferu malsaton". Sed la reala stato donis plaŭde al Johnson kaj similaj solidan vangfrapon.



Mistera Eksplodigo

En vintro de 1944, la japanaj agresaj banditoj alvenigis kvar-kvin mil soldatojn el la okupita urbo kaj kaptis kiel portistojn por si vilaĝanojn kun intenco lanĉi surprizatakon al la trupoj de la Okavoja Armeo en nia zono. Sed ili faris miskalkulon kaj falis en nian embuskon.

La junuloj kaj plenkreskuloj de Ŝanglu-vilaĝo jam sin kaŝis antaŭlonge kaj neniu el ili estis kaptita de la japanaj diabloj, eĉ la maljunuloj kaj infanoj jam forkaŝiĝis. La 14-jaraj Hiaŭjan kaj Erhuaj estis pro malzorgo kaptitaj de la diabloj kaj forportitaj. La diabloj trenis ilin ekster la vilaĝon kaj devigis ilin

porti pezajn tornistrojn. Neĝo grin-cadis sub iliaj piedoj. Irante survoje, Hiaŭjan pensis: "Ni devas batali por savi la patrion kontraŭ la japana imperiismo. Mi, membro de la Infana Ligo, ja ne lasos la diablojn fari al mi kion ili volas. Sed kion fari nun? Forkuri ja ne eblas." Kun la pensado iom mal-

rapidigiĝis liaj paŝoj. "Frap!" — japano post li lin batis per la kolbo kaj preskaŭ lin faligis. Vidante, ke Hiaŭjan ricevis baton, Erhuaj rondigis siajn okulojn kaj ekvolis insulti, sed ankaŭ li ricevis du vang-frapojn neatendite. La buŝo sangis. Hiaŭjan kaj Erhuaj saturiĝis de malamo.

La suno estis subiranta. La du knaboj iradis plue sub eskorto de la japanaj diabloj. Subite ekkrakadis pafoj kaj kanonoj tondris senĉese tiel forte, ke en iliaj oreloj kvazaŭ zumegas aeroplano. Ili pensis, ke la diabloj certe falis en embuskon de nia Okavoja Armeo. Ili rigardis unu la alian nereteneble kaj ĝojiĝis kun interkompreno. Kugloj tiam flugadis siblante unu post alia super la kapoj, kaj falis japanaj diabloj unu post alia. Vidante ke ne plu eblas iri antaŭen, la diabloj do kuŝiĝis por pafadi. Post la noktomezo, la fusil- kaj kanon-pafado de la Okavoja Armeo pli furioziĝis, kaj la kuŝantaj diabloj ne kuraĝis levi sian kapon. La ŝirmaĵo, kiun ili fosis en hasto,

baldaŭ estis ebenigita, kaj tiam ili konkure kuris post tombaltaĵon por sin ŝirmi. Je la kvara aŭ kvina en la mateno, la malamikoj falis en panikon pro la solida draŝado. La pafoj en la ĉirkaŭaĵo iom post iom malmultiĝis.

Hiaŭjan svenis plurfoje pro frosto, malsato kaj trolaciĝo. Kiam li rekonsciiĝis, li trovis ke Erhuaj ankoraŭ kuŝas en sveno kaj la diabloj apud li ĉiuj kuŝas senmove. Sed ne malproksime de li ankoraŭ energie krakadas maŝinpafilo de la diabloj. Li pensis: "La Okavoja Armeo certe estas klopodanta por kapti tiun pozicion. Kiel bone estos, se ili ŝtele atakos de malantaŭe!..." Kaj li pensis krome: "Mi estas membro de la Infana Ligo, mi devas klopodi por ekstermi la japanajn agresajn banditojn sub ĉia ajn cirkonstanco, eĉ je la kosto de mia vivo!" Kaj tiam li tuj liberiĝis de timo kaj forgesis la malsaton kaj malvarmegon. Li turnis sian vizaĝon kaj rimarkis, ke sur la korpo de mortinta diablo apude kuŝanta troviĝas ok mangre-

nadoj. Jen armiloj! Hiaŭjan plene streĉis kuraĝon, etendis sian manon kaj prenis unu mangrenadon. Li leviĝis, eltiris la fadenon kaj forĵetis la mangrenadon per la tuta forto. Bum! Ĝi eksplodis, kaj sekve de tio tuj mutiĝis la maŝinpafilo de la diabloj. La Okavoja Armeo baldaŭ okupis la pozicion.

Kiu faris la misteran eksplodigon? Dum traserĉado de la batalejo, batalantoj de la Okavoja Armeo trovis la svenintajn knabojn, el kiuj unu ankoraŭ firme tenis mangrenadon!

Kiam Hiaŭjan venis en konsciiĝon, li trovis sin kuŝanta jam en varma domo. Iu gvidanta kamarado el la Okavoja Armeo sidis antaŭ li kun rideto kaj zorgemo kaj demandis pri ilia travivaĵo. Informiĝinte pri la tuta mistero pri la detruo de la malamika maŝinpafilo, la gvidanta kamarado diris karesante la kapon de Hiaŭjan per sia mano kaj lin rigardante kun admiro: "Vi ja meritas la nomon de brava membro de la Infana Ligo!"



Letero de Itala Leganto G. L. P.

Viaj sendaĵoj venis al mi kaj ĉiam estas tre akceptataj, ĉar mi estas avida sciiĝi pri travivo de ĉinaj kamaradoj.

Por laŭdi la GRANDAN GVIDANTON Kamaradon MAŬ ZEDONG, miaj vortoj ne estas sufiĉaj; malgraŭ tio mi bondeziras al li longan vivon, ĉar la vivo de Kamarado Maŭ Zedong estas ne nur por savi la ĉinan popolon, sed ankaŭ por savi la tutan mondon; jam antaŭe mi nomis MAŬ ZEDONG la dua LENIN.

Ĉiutage mi sekvas la okazintaĵojn de buĉado en Vjetnamio, pre-

cipe nuntempe post ke la ekzekutisto Johnson elsendis tra la mondo signalon de paco; ĉu tiu mensogemulo ne hontas bruadi la vorton "paco"? Oni vidas, ke ree estas anĝelo kun du vangoj, kiuj ne ruĝiĝas malgraŭ ke li naĝas en rivero de sango, tamen la krokodilo nun pripensas la malvenkon, kaj pro tio alvokas "paccon".

Mi kore laŭdas Kamaradon MAŬ ZEDONG kaj Gefratojn de la tuta Ĉinio kaj deziras al ili prosperon.

Letero de Nederlanda Leganto J. D.

Mi dankas vin por la belegaj bildkartoĵoj. Tio estas tre bela. Vi iras al la venko sub la konduko de via Granda Gvidanto. La reakciulo Ĥruŝĉov malvenkos kune kun lia amiko Ĝiang Kajŝek, kiu estas en Tajvan. En via patrio nun regas prospero, kaj la popolanoj ĉie studas

la ruĝan libron de Maŭ Zedong, kiu jam disvastiĝis tra la tuta mondo. Marksismo kaj leninismo venkos tra la mondo.

La batalo de Vjetnamio estas ankaŭ la nia. La malgranda Vjetnamio estas tre forta, ĉar ili batalas por la libereco kaj nepre venkos.

Letero de Jugoslava Leganto S. R.

Kiam ajn mi ricevas la plaĉan reuon EPĈ, mi sentas feliĉon havi en manoj amikan originalan fonton, kiu estas utiliganta la praktikan internacian lingvon Esperanto kaj atinganta min el Ĉinio por doni informojn de diligenta kaj heroa popolo. Legaĵoj el Ĉinio vekas interesiĝon ankaŭ ĉe miaj amikoj, iuj eĉ decidis eklerni Esperanton por tiamaniere povi uzi la originalan fonton de informoj el Ĉinio.

Sur la kovrilo:

Aperis nova proletara revolucia artspeco, la fortepiana akompano al kantado de la pekina opero *Ruĝa Signal-lanterno*. La foto montras kantadon de la heroo filino Li Tiemej en la opero. Fortepianon ludas Jin Ĉengzong kaj kantas Liu Ĉangju.

Sur la dorskovrilo:

En la vespero de festotago, diverskoloraj artfajraĵoj brilegas super Tian-anmen-placo. La amaso bolas pro ĝojo.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 10 (123) 1968

Ĉefa Enhavo

Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Spektis Fortepianan Akompanon al Kantado de la *Ruĝa Signal-lanterno* kaj Simfonion *Ŝagiabang*

Nova Speco de Revolucia Arto

Pri la Olepentraĵo *Prezidanto Maŭ al Anjuan*

Fremdlandaj Maristoj Korinklinas al Prezidanto Maŭ
Longan Vivon al Prezidanto Maŭ (kanto)

Triumfaj Kantoj el la Produkta Fronto de Industrio kaj Agrikulturo

Prospere Disvolviĝas la Industria Produktado en Ŝanhajo
La Prosperantaj Stepoj de Interna Mongolio

Iom pri la Fiŝbredado en la Trapa Lago

Medicina Taĉmento Aktivanta en la Regiono de Kimen-
monto

Kiel Mi Kuracis Mutulojn

Revolucia Pioniro

Sekvi Prezidanton Maŭ Signifas Venkon

Post Ŝanĝiĝo de la Pozicio

Sinremuldi inter la Amasoj

La Amaso Estas Vera Heroo

Rakonto pri Malŝarĝo de Varŝipo "Zamenhof"

Bankrotis la "Aera Supereco"

Nova Vekiĝo de la Jugoslavaj Studentoj

Kia Varo Estas la "Traktato pri Nedisvastigo de Nukleaj
Armiloj"?

Intermordado de Hundoj

Malgranda Helpe de Granda Komplico

Prezidanto Maŭ, la Karbminejaj Laboristoj Estas Fidelaj al Vi!



La laboristoj de Datong-a Karbminejo kaj la PLA-anoj subtenantaj la maldekstrulojn interparolas pri sia senfina amo al Prezidanto Maŭ.

狠批中国赫鲁晓夫鼓吹的
《剥削有功》论！



Maldekstre supre: La revolucia komitato de Liaŭjuan-a Karbminejo en Gilin gvidas la revoluciajn laboristojn kaj oficistojn disvolvi profunde la revolucion amasan kritikon kaj multe levas ilian klaskonscion kaj konscion pri la batalo pri linio.

Dekstre supre: La familianoj de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Vanggiahe-ŝakto de Dongfanghong-minejo ĉiam iradas en la ŝakton por partopreni senpagan laboron de fosado kaj transporto de karbo de post 1967, kaj ili studas la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kune kun la revoluciaj laboristoj.

Maldekstre malsupre: La laboristoj de Dongfanghong-minejo de Vejbej-a Karbminejo luktas por fosi novan galerion por krei pli bonajn kondiĉojn por karbproduktado.

Dekstre malsupre: La karbo produktita de Linhi-minejo de Kajluan-a Karbminejo estas senĉese forportata por subteni la socialisman konstruadon.



